

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2009 numero 1-a: januaro-marto
dissendo je la 4-a de februaro



Fotis Claude Gacond

Vintra pejzaĝo en La Vue-des-Alpes je la 1-a de januaro 2009

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2009-2 : aprilo-junio :

aprile 10, dissendo 1-a de majo.

2009-3 : julio-oktobro :

aŭguste 10, dissendo 1-a de septembro.

2009-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-a de novembro.

2010-1 : januaro-marto :

januare 10, dissendo 1-a de februaro.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
076 261 06 09.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 076 261 06 09.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
Muttenz 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2009-1 - Redaktis: Claude Gacond

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 16-an de majo 2009

*La Chaux-de-Fonds, en kunlaboro kun CDELI
Freska Salono Charles Humbert de la Urba Biblioteko
Strato Progrès 33, 1-a etaĝo.*

Horaro :

- 10.00 Malfermo de la bibliotekaj salonoj de CDELI kaj Charles Humbert.
- 10.30 **Kunveno de la Esperanto-Fako de la Amikaro de CDELI** (en la CDELI-salono). Informado en la rubriko CDELI ĉe la parto **Tutsvisa aktiveco**.
- 11.00 Kafumo, eblo aĉeti librojn kaj brokantaĵojn (en la CDELI-salono).
- 11.30 Ĝenerala Kunveno de SES (en la Salono Charles Humbert).**

Tagordo

1. Salutado, kontrolo de la ĉeestantoj kaj senkulpiĝoj.
 2. Akcepto de la tagordo.
 3. Evoluo de la membraro.
 4. Akcepto de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2008a (Berno) aperinta en *SES informas* 2008-3 p. 5-9.
 5. Akcepto de la Estrara Raporto (aperonta en *SES informas* 2009-2).
 6. Akcepto de la Financa Raporto (aperonta en *SES informas* 2009-2).
 7. Akcepto de la Raporto de la kaskontrolantoj (aperonta en *SES informas* 2009-2).
 8. Projekto « Konkurso por lernantoj de Esperanto » (prezentota en *SES informas* 2009-2).
 9. Akcepto de la Buĝeto (aperonta en *SES informas* 2009-2).
 10. Aprobo de la alelekto de Nelida Weidmann al la Estraro de SES.
 11. Eblaj pliaj elektoj (laŭ informoj aperontaj en *SES informas* 2009-2).
 12. Proponoj (Ĉiu propono subtenata minimume de tri SES-anoj devas atingi la prezidanton Dietrich Weidmann ĝis la 1-a de aprilo).
 13. Diversaĵoj.
- 13.00 **Komuna tagmanĝo** (en najbara picejo).

14.30 **Kultura programo** organizita de CDELI (en la salono Charles Humbert)

1. Sub la gvido de Elisabeth de Mestral la Svisa Koruso prezentos 6 aŭ 7 kvarvoĉajn kantojn, inter kiuj tradiciaj kantoj el Svislando, baroka kaj renesanca kantoj el Francio kaj popolaj melodioj el Finnlando.

2. La gelernantoj de la lernejo *La Grande-Ourse* parolos al vi en esperanto per teatra spektaklo, kiun ili nun pretigas.

3. Benno Frauchiger raportos pri sia unujara biciklado de Svislando al Aŭstralio tra Kosovo kaj la aziaj landoj Irano, Pakistano, Hindio.

La definitiva programo aperos en la venonta bulteno *SES informas 2009-2*.

16.15 Konkludo de la kultura programo kaj supreniro al la salono de CDELI por amika teumo kaj butikumo.

16.30 **Oficiala konkludo de la renkonto.**

17.30 Fermo de la salono de CDELI.

Infanoj

Paralele al la ĝenerala kunveno kaj al la kultura programo okazos okupoj ludaj kaj paroligaj por la infanoj en lerneja aĝo, kun promenado al la bestĝardeno. La gepatroj venontaj kun siaj infanoj bonvolu sin anonci al Nancy Fontannaz :

Rete : nancy.fontannaz@gmail.com

Telefone : 021 728 31 27.

Ili indiku siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron kaj la nomon kaj naskiĝdaton de la partoprenontaj infanoj.

La SES-Estraro esperas je multnombra partopreno al tiu tago grava por la societo kaj dankas al CDELI pro ties kunlaboro.

Kiu estas Nelida Weidmann-González Fonseca

Sekve al rekomendo de la Ĝenerala Kunveno 2008-a en Berno la Estraro de SES alektis al si s-inon Nelida Weidmann. Ŝia ĉefa tasko estos la organizado de la Svisa Familia Esperanta Renkontiĝo (SFERO) de SES, kiu en 2009 okazos oktobre en la vilaĝo Lenk. Ŝia ĝenerala aktiveco direktiĝos ankaŭ al la rilatoj kun la gejunuloj kaj esperanto-familioj.

Nelida Weidmann-González Fonseca naskiĝis la 24-an de septembro 1961 en Havano en Kubo kiel 3-a de 7 gefratoj. Ŝi eklernis esperanton kiel junulino en la loka Esperanto-Klubo de Havano. En 1990 dum la Internacia Junulara Kongreso ŝi konatiĝis kun sia nuna edzo Dietrich Weidmann. Nelida vivas ekde 1991 en Svislando kaj aktivas en la Esperanto-movado jam de pluraj jaroj kiel sekretariino de Esperanto-Societo Zuriko. Nelida ankaŭ okupiĝas pri muziko kaj filmado. Ŝi ekzemple produktis en esperanto dokumentan filmon pri la Novjara Renkontiĝo en Trier 2006-2007 kaj la muzik-kompaktdiskon « *La Vagabondo* ».

Donacoj al SES
ricevitaj dum oktobro, novembro kaj decembro 2008
entute 385.- svisaj frankoj

(30.-) Ge-roj Teresita + Tazio Carlevaro, Bellinzona ; (15.-) S-ino Sonia Chatelan-Daubercies, Belmont ; (25.-) S-ro Eugen Hoerkens, Zürich ; (40.-) S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds ; (30.-) S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz ; (50.-) Lucerna Esperanto-Societo ; (40.-) S-ino Jeanne Mamin, Clarens ; (25.-) S-ro Hans Meier, Basel ; (5.-) PARZIVAL, Biel ; (35.-) S-ino Mady Lynn Reymond, Neuchâtel ; (10.-) S-ro Olivier Tzaut, La Chaux-de-Fonds ; (80.-) S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne.

Ekinformo pri la
Svisa Familia Esperanta Renkontiĝo (SFERO)
okazonta la 16–18ajn de oktobro

Post la sukceso de la lasta SFERO 2008a ni decidis reokazigi ĝin en 2009. Ĉi foje en la centro pri kursoj kaj sportoj de LENK en SIMMENTAL www.kuspo.ch.

Nia celo estas doni la eblon al esperantistoj kaj ne-esperantistoj kunvivi la esperantan etoson kaj montri, ke ankaŭ en Svislando esperanto estas vivanta lingvo. Tiu renkontiĝo ne estas nur por familioj, sed ĝi ankaŭ estas malfermita al ĉiu, kiu interesiĝas pri esperanto kaj ties kulturo.

La tranoktaj lokoj en du- kaj kvar-litaj ĉambroj estas limigitaj (disponeblas nur 3 du-litaj ĉambroj kaj 3 kvar-litaj ĉambroj). La restantaj 2 ĉambroj estas kun po 16 litoj. Deziroj pri ĉambroj estos konsiderataj laŭ la vico de la aliĝoj.

Pliajn informojn pri loĝado kaj prezoj vi trovos sub www.esperanto.ch/sfero.
La paĝo disponeblas ekde la 26a de januaro 2009.

Vi povas ankaŭ aliĝi:

rete: nelida@esperanto.ch

telefone +41-(0)44 251 50 25 (lunde-vendrede de la 10.00-12.00 kaj de la 14.30-15.00).

Bonvolu aliĝi kiel eble plej frue, prefere antaŭ la 1-a de majo.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoĵ : claudio.gacond@ne.ch, martine.schneller@ne.ch, nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **februare 21 kaj marte 21.**

Kultura seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **februare 7 kaj aprile 4.** La studo-temo estos la novelarto en esperanto. Instruas Claude Gacond.

Studemuloj nepre rezervu tiujn ĉi datojn en sia agendo.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babilo kaj kafumi.

10.20 : Oficiala malfermo per formiĝo de la stud-rondoj. 10.30 :

Studo. 11.30 : paŭzo. 11.45 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo. 14.15 : Studo. 15.15 : paŭzo. 15.30 : Studo. **16.30 : Konkludo** kaj teumo, libro-vendo. **17.30 : Oficiala fermo.**

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj **ĉiu bonvolu nepre anonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo unu semajnon antaŭ la koncerna aranĝo al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete :**

nancy.fontannaz@gmail.com

Partopren-kotizo : Por minimuma kovro de la elspezoj la partopren-kotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj). **Plusa pago de Fr. 5.- estos petita de tiuj, kiuj ne akurate anoncis sian partoprenon la ĵaŭdon antaŭe.**

Esperanto-Amikaro de CDELI

La informado kaj alvoko pri la kreo de Asocio de Amikoj de CDELI, kiuj estis dissenditaj fine de novembro dank'al la diskoniga kunlaboro de SES, ricevis kuraĝigan apogon. Per sendo de kotizoj 30-frankaj anonciĝis kontentiga nombro de Esperanto-Amikoj de CDELI por la jaro 2008. Ilia malavareco ebligis salajri

la bibliotekistinon Martine Schneller por ŝia kataloga laboro novembra, decembra kaj januara. Sonia Béatrix-Koleva, la kasistino de la krea asocio nun pretigas la liston de tiuj Amikoj 2008-aj. Ili baldaŭ ricevos dankan cirkuleron, kiu instigos ilin al renovigo de sia amikeco por la jaro 2009. Tiu informilo ankaŭ anoncos la tagordon de la asembleo franclingva de la vendredo 15-a de majo, kiu oficialigos la kreon de la asocio, kaj de la kunveno esperantlingva de la sabato 16-a de majo disvolviĝonta ĵus antaŭ la jarkunveno de SES. Sciigoj pri tiuj aranĝoj ankaŭ aperos en la CDELI-rubriko de *SES informas* 2009-2.

Atentigo pri du sabataj renkontoj


La 27-an de junio Mireille Grosjean prelegos en CDELI pri sia multmonata vojaĝo en Azio : Matene ŝi reliefigos turismajn aspektojn kaj posttagmeze ŝi raportos pri la esperanto-vivo en la vizititaj aziaj landoj.

La 15-an aŭ la 22-an de aŭgusto Mireille Grosjean organizos ankaŭ en CDELI renkonton kun la s-ro Privas Tchikpe el Benino, kiu restados en Les Brenets en aŭgusto. Tiu afrikano pretas prelegi pri Benino ĝenerale kaj pri esperanto en tiu lando. Fakte li estas la unua esperantisto en Benino.

Nepre rezervu tiujn datojn en via agendo por povi ĉeesti tiujn interesajn renkontojn, kiuj disvolviĝos laŭ la kutima horaro de la sabataj kunvenoj en CDELI.

-oOo-

Svisa familia semajnfino en Gantrisch. 1-2 novembro 2008



Christian Franciska Fischer, Jolan kaj Ael Bartoli, Linda kaj Jasmin Weidmann, Olivia Fischer, Romain kaj Samuel Bélisle.

Raportas Elisabeth de Mestral

Svislando estas vere taŭga lando por uzi esperanton inter niaj plurlingvaj regionoj, ĉu ne ? La projekto de familia renkonto iĝis reala la 1-an kaj 2-an de novembro 2008, kiam alemanoj kaj romandoj renkontiĝis en Sangernboden en la berna Gantrisch-regiono.

Tiu familia semajnfino estis tre bone organizita de Mara kaj Daniel Schöni Bartoli. La programo estis tre diversa kaj distris tiom la infanojn kaj la gejunulojn, kiom la plenkreskulojn.

Por konatiĝi oni tuj komencis per paraŝut-ludo gvidata de Marion Bélisle. En la salono vento blovis, ĉiuj kuris, pilketoj saltis, infanoj kriis, plenkreskuloj ridis... tre bona ludo por gajigi la etoson !

Viva kaj varia posttagmezo

Paroliga tabloludo organizata de Mara Bartoli – efika kaj plaĉa ludo bazita sur nia « ansera ludo ».

Diskuto pri la 2a ĉapitro de la *Infana raso* de William Auld, gvidata de Dominique de Mestral – filozofia momento.

Por la infanoj : ludoj kaj preparado de magiaĵoj por la vespero animata de Olivia kaj Wolfram Fischer.

La posttagmezo finiĝis per dancoj el Bulgario, Bolivio, Usono, Grekio, kiujn Nicole Margot instruis al la partoprenantoj. Ni trapasis tre plaĉan kaj ridigan momenton... ĉefe kiam ni forgesis la ĝustajn paŝojn kaj niaj piedoj ŝtumblis...

Vespera kultura programo

Elisabeth de Mestral (soprano) kaj Wolfram Fischer (piano) prezentis 5 francajn melodiojn esperantigitajn de Dominique de Mestral. La aŭskultantoj povis malkovri la romantikan etoson en *Bela vespero* de C. Debussy, *Apud river'* de G. Fauré, *La kera reĝino* de F. Poulenc kaj ŝercemajn tekstojn en *La balado de la dikaj meleagroj* de E. Chabrier kaj *Ebriiĝo* de J. Offenbach.

Poste ni spektis magiaĵojn preparitajn de la gejunuloj kaj de la infanoj.

Linda kaj Jasmin Weidmann rolis sorĉajn divenulojn, kiuj divenis, kiu ludkarto estis elektita de la ĉeestantoj. (La ludkartoj estis tre bele desegnitaj de la infanoj.)

Romain kaj Samuel Bélisle rolis magojn, kies flaro rekonis ĉiujn seĝojn, sur kiuj partoprenantoj estis sidantaj. Ĉiuj bone amuziĝis !

La vespero finiĝis per cerbuma ludo : Kvizo preparata de Daniel kaj Mara :

5 teamoj miksitaj de plenkreskuloj kaj infanoj respondis al diversaj demandoj, kies temo estis Mazilando, historio, literaturo, bestoj, ktp... bona ludo por vigligi la memoron kaj de la junaj kaj de la malpli junaj !

Dum la dimanĉa mateno Didi Weidmann klarigis, kiamaniere ĉiu povas uzi kaj pliriĉigi la tre interesan Vikipedion en esperanto. Ekzemple li mem priskribas ĉiujn svissajn glaĉerojn. Pri tiu subjekto alilingve troviĝas tre malmulte da informoj.

Poste okazis ronda tablo, kies temo estis : ĉu esperanto por vi estas ŝatokupo aŭ pli ?

Dumtempe, per la arto de paperfaldaĵoj, la infanoj kreis birdojn kaj ranojn kun la helpo de Wolfram kaj Mirta, kaj konstruis belajn koloritajn kajtojn kun Nancy Fontannaz.

Por la posttagmezo estis antaŭvidita diskuto pri la estonteco de esperanto, sed ĉiuj elektis aerumiĝi inter herbejoj, arbaroj kaj admiri tiun belan montaran regionon jam superŝutitan de frua neĝo. Ĉu la diskuto ne interesis la partoprenantojn ? Ĉu kelkaj fajfis pri la esperanta onto ?... Ne tute, ĉar nova renkontiĝo estas jam planita.

Adiaŭoj

Sur la placo de la lernejo 5 membroj de la svisa koruso kantis 2 svisajn kantojn : la Jodlado kaj la Belaj Vilaĝoj... poste kisoj, brakumadoj, bruoj de aŭtoj... jam la festo estis finita.

Mi konkludas kun penso por la infanoj, kiuj alportis multe da vivo inter ni, kaj mi ĝojis aŭskulti kelkajn el ili flue paroli esperante.

Mi gratulas kaj redankas al Mara kaj Daniel kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis animi kaj gajigi tiun tre plaĉan semajnfino.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. & Fakso : 032 926 74 07

kce.esperanto@bluewin.ch

KCE festis sian 40-jariĝon la 13-an de decembro

Raportas Claude Gacond per kelkaj fotoj aktualaj kaj historiaj

La sabaton 13-an de decembro la Esperanta Civito invitis al amika festado de la 40-jariĝo de KCE, kiu estis fondita en Biel/Bienne la 15-an de decembro 1968. La paroladojn de Perla Martinelli, la nuna prezidanto de KCE, kaj de Marie-France Conde Rey, ĉirkaŭis agrablaj muzikaj kontribuoj de Marion Bélisle-

Grosjean, Jean-Thierry von Büren kaj Olivier Tzaut. Ili estas relegeblaj en la decembra numero 2131-a de *Heroldo de Esperanto*, same kiel kultura kontribuo de Giorgio Silber.

La sekvaj fotoj konkrete raportas pri tiu amika rendezuo kaj ankaŭ rememorigas la fondan kunvenon de antaŭ 40 jaroj.



Marion Bélisle-Grosjean



*Olivier Tzaut kantas la Himnon
ĉirkaŭata de Marion Bélisle, Andrée
Gacond kaj Jean-Thierry von Büren.*



*Perla Martinelli, la nuna prezidanto
de KCE, invitanta al la aperitiva
konkludo de la festa kunveno.*



*Sonia Brun, prezidinto de KCE,
diskutanta kun Dieter Rooke kaj ties
filo Ciri*




*Dum la fonda kunveno de la 15-a de
decembro 1968 en Biel: Hans
Hunkeler, Werner Läderach, prezid-
anto de SES kaj de la kunveno, kaj
René-William Perrenoud elektita
vicprezidanto kaj kasisto de KCE.*



*August Braun elektita prezidanto de
KCE kaj Marcel Erbetta, prizorg-
anto de la interlerneja rondaro
Grajnoj en Vento.*

*Claude Gacond, la realiganto de tiuj
fotoj, estis elektita sekretario de
KCE.*



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

Venontaj kunvenoj

Februare 12 : Ĝenerala Jarkunveno ekde la 20.15: **Tagordo**:

- 1 Bonvenigo.
- 2 Elekto de tagprezidanto.
- 3 Protokolo de la pasinta ĜJK 2008.
- 4 Aliĝoj kaj eksiĝoj.
- 5 Raportoj:
 - a) de la prezidanto.
 - b) de la kasisto kaj kaskontrolantoj.
- 6 Senŝarĝigo de la estraro.
- 7 Elektoj:
 - a) de la prezidanto.
 - b) de la vicprezidanto.
 - c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj.
 - d) de la sekretario.
- 8 Kontribuoj.
- 9 Proponoj skribe prezentitaj ĝis la 12a de februaro.

Jarkotizo: La societa jarkotizo estas por membro unuopa: Fr 25 kaj por paro: Fr 30 kaj la societa poŝta konto de Esperanto-Societo Basel estas 40-

33714-4. La kotizantoj ricevas la bultenon *Sud-Rejna Kuriero*, kiu komunas al Esperanto-Societo Basel kaj al Mulhouse-Esperanto.

El la prezidanta raporto

La pasinta ĝenerala jarkunveno okazis en januaro. Februare la grupo parolis pri Britio kaj Nicole Béroud-Focke alportis bildojn pri sia lasta vojaĝo en tiu lando. Marte okazis ludo je skrablo, aprile legado de partoj de *Gerda Malaperis* elektitaj en novembro 2007 kaj maje spektado de eroj el la koncerna filmo.

En junio, pro la eŭropa pilkludado inter Hispanio kaj Rusio, la grupo rezignis pri sia tradicia irado al Grün'80 pro timo de troa trafiko al la Fan ekranoj.

En la julia monato la grupo venis al Inzlingen por vespermanĝi kaj agrable babiladi. La jara ekskurso kondukis al Bettingen, el kie okazis migro al Chrichona, en kies restoracio ĉiuj agrable paŭzis, antaŭ ol reveni al Bettingen per vizito de la bela ĝardeno de Hans-Peter Senn kun kradrosto de bongusta manĝo kaj trinkado kun ĝuo pri la belega vetero.

En septembro ĉiuj rakontis pri siaj ferioj kaj estis pretigita la zamenhofa festo. En oktobro Rainer tre interese prelegis pri Norvegio. La novembra kunveno estis dediĉita al la planado de la venontjara programo kaj al la finpretigo de la zamenhofa festo, kiu decembre grupigis dudekon da personoj, kiujn tre interesis la rakonto de Andy Künzli pri la rilatoj inter Hector kaj Ferdinand Hodler. Sekvis bonega rakledo en amika etoso.

Nicole Bérout konkludis sian raporton opiniante, ke eĉ se rondo ne grandas, tamen valoras flegi la grupan vivon kaj respondi al la alvenantaj informpetoj. Ŝi konstatis, ke bedaŭrinde la instruistoj, kiuj devus povi konsili la liceanojn por ties antaŭabiturienta finstuda esplorklaboro, kiam temas pri esperanto, verŝajne ne multon pli scias, ol la lernantoj mem, kiuj decidis dokumentiĝi pri esperanto. Tial ilia pedagogia helpo estas bedaŭrinde tre supraĵa.

Marte 3: Karnavalo.

Marte 26: Ludo je skrablo.

Aprile 23: Rakledo ĉe Hans-Peter Senn.

Maje 28: Filmo *Gerda malaperis*.

Junie 25: Grün'80.

Julie 9 aŭ 16: Salat-bufedo ĉe familio Focke.

Aŭguste 23: Ŝipveturada ekskurso al Rheinfelden.

Septembre 24: Ĉiu parolas pri siaj ferioj.

Oktobre 22: Legado – legaĵoj.

Novembre 26: Venonta programo.

Decembre: Zamenhofa festo.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Venontaj kunvenoj

Marte 3: Ĝenerala Jarkunveno de La Stelo.

Aprile 7: Kunveno « Claude Piron inter ni ».

Esperanto

en la Teatro de Carouge

La prizorgantoj de *Théâtre de Carouge* kontaktis s-inon Charmian Common, por ke aperitivo enkonduka al la spektaklo "*Candide*" de Voltaire, laŭ adapto de Yves Laplace, estu dediĉita al la temo esperanto, ĉar Kandid multe vojaĝis kaj vizitis la utopian landon *Eldorado*. La trinkaĵo tiam oferita estis verdega koktelo kaj la esperantistoj devis saluti la alvenantojn kaj respondi al eblaj demandoj. Regis afabla etoso. Enire al la aperitivejo estis projekciitaj esperante sur la muron la unuan kaj lastan frazojn de la teatraĵo: "*Jen mi, Kandid. Mi estis sen nomo je la tago de mia naskiĝo.*" kaj "*Tio estas bone dirite, respondis Kandid. Sed ni devas kulturi nian ĝardenon.*" Por rilati kun la publiko Charmian Common estis helpata de Marie Zoller, Gilda Pace, François Randin kaj David Bühlmann.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

ccp 10-26785-8

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20.00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann

Tel. : 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :

Stéphanie Strappazon 079 415 33 16 ;

Sekretario : Francisko Randin 076 411 14

55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88

86.

Raporto

La Zamenhofa Festo okazis la 13-an de decembro kun 20 partoprenantoj. Ni aperitivis ekde la 11-a kaj plezure renkontis kelkajn inter ni, kiujn ni ne vidis de longe. Kiel kutime nia akordionisto Claude Blanc agrabligis la renkonton per muzikaĵoj. La manĝo organizita de nia kasistino estis riĉega. Kelkaj plezuris prepari desertojn kaj ĉiuj alportis trinkaĵojn, inter kiuj tre bongustajn vinojn. La prezidanto David Bühlmann rakontis pri la naskiĝo kaj la vivo de Zamenhof kaj li omaĝis al Marguerite Jaccard per legado de kelkaj linioj el ŝia libro, kiujn li esperantigis.

Venontaj kunvenoj

Februare 2 : Ĝenerala asembleo.

Marte 2 : Projekciado de kelkaj filmoj NANDIR, ekzemple de la plej freŝdata: *La Patrolo de la Glaciejo* kaj la *UK en Roterdamo*.

Aprile 6 : David Bühlmann kaj Lucienne Dovat parolos pri la vivo de L. L. Zamenhof, kaj pri la internacia lingvo en Svislando kaj en Lausanne.

Maje 4 : Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj, ni provos respondi al vi. Venu kun viaj mal-kovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj, vi prezentos ilin al ni.

Junie (dimanĉo): Ekskurso.

Septembre 7 : Programo decidota.

Oktobre 5: Programo decidota.

Novembre 2: Programo decidota.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Bären, Flecken 11, Rothenburg.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimat-

weg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Februare 21 (sabate) ĉe Bären,

Rothenburg: 10.00 : **Ĝenerala**

Kunveno de LES kun la LES-estraro.

Marte 4 (merkrede) ĉe Rey : 14.00 :

Paroliga leciono kun Paul Scherer,

14.30 : **Iamaj originaluloj de**

Lucerno kun Sonja Brun.

Aprile 1 (merkrede) ĉe Bellini :

14.00-16.00 : **Konversacia rondo**

kun Sonja Brun.

Maje 6 (merkrede) ĉe Rey : 14.00 :

Paroliga leciono kun Paul Scherer,

14.30: **La societo de la vapor-ŝip-**

amikoj kun Kony Rey.

Junie 3 (merkrede) ĉe Bellini :
14.00-16.00 **Konversacia rondo**
kun Sonja Brun.

Julie 1 (merkrede) ĉe Rey : 14.00 :
Paroliga leciono kun Paul Scherer,
14.30 : Ludado kun Sonja Brun (ĉiu
prezentu ludon).

Aŭguste 7 (vendrede) **Vespera
promenado** kun Koni Rey (la
koncerna programo estos anoncita).

Septembre 2 (merkrede) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo**
kun Sonja Brun.

Oktobre 7 (merkrede) ĉe Rey :
14.00 : **Paroliga leciono** kun Paul
Scherer, 14.30: **William Auld kaj
La infana raso** kun Sonja Brun.

Novembre 4 (merkrede) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo**
kun Sonja Brun.

Decembre 2 (merkrede) ĉe Rey :
14.00 : Zamenhofologio kaj pretigo
de la Programo 2010 kun Paul
Scherer.

2010 Januare 6 (merkrede) ĉe
Bellini : 14.00-16.00 : **Konversacia
rondo** kun Sonja Brun.

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder,
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071
393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj
Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116
Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O)
071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun
unuan merkredon en la monato vespere
inter la sepa kaj la naŭa en la b'treff en
Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Februare 4: Jarkunveno. Poste
kommentata gvido tra la oficejo de
kuracisto: Vilaĝa kuracisto prezentas
sian laboron.

Marte 4 : Interparolo pri filozofia
teksto. (Ĉekomence rakonta rondo.)

Aprile : (Neniu renkontiĝo.)

Maje 6 : Provleciono en Flawil.

Junie 3 : Prelego: La metio de grafo-
logo (demandoj kaj respondoj).
(Ĉekomence rakonta rondo.)

Julie 1 : Tradicia vizito de la turo de
Wil.

Aŭguste 16 : Tuttaga ekskurso al
Winterthur.

Septembre 2 : Impresoj kaj tra-
vivajaĵoj de la Universala Kongreso en
Bialistoko. (Ĉekomence rakonta
rondo.)

Oktobre : (Neniu renkontiĝo.)

Novembre 5 : Gastprelego: Kiel
gasto en Benino, Koreo kaj Japanio
(demandoj kaj respondoj). (Ĉe-
komence rakonta rondo.)

Decembre 2 : Fonduovespero kun
poemoj, rakontoj, kantoj.


Zürich

Esperanto-Societo Zürich

(Adreso: Akazienstrasse 6, Poŝtfako 858,
CH-8034 Zuriko)

**Informojn pri la aktuala
programo de Esperanto-Societo
Zuriko vi trovos en la reto sub:**

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht



Kongresen

Tutazia kongreso de Esperanto en Mongolio

Mireille Grosjean informas, ke en junio 2010 (de la 19a ĝis la 23a de junio) okazos tutazia kongreso de Esperanto en Mongolio. Tio estas kunveno de KAEM de UEA: Komisiono pri Azia Esperanto Movado.

Ŝi intencas partopreni ĝin kaj jam du aliaj personoj el Svislando ankaŭ anoncis sian intencon ĝin ĉeesti. Do organiziĝos karavano.

Bonvolu pripensi, ĉu vi same deziras malkovri tiun landon kaj renkonti azianojn konatajn kaj nekonatajn. Interesatoj informu Mirejon, kiu elkore salutas el Japanio.

Bonvolu legi : mirejo.blogspot.com

-oOo-

Dek-du tagoj survoje al Roterdamo per biciklo Luc Allemand

(Daŭriga raporto)

Lundon 7-an de julio : 2-a tago

Nekredeble : Jam iu respondis je nia retmesaĝo dum la nokto ! Estas S-rino Christine Kopitek el Dienheim, domareto sude de Mainz. Ŝi senprobleme gastigos min ĵaŭde vespere. Dum la tago mi ankaŭ ricevos telefonan *sms* de Mirjam el Ruchheim, kiu bonvenigos min merkrede vespere.

Bertrand akompanas min horon sur bicikla vojo preter Rejno, riverego kiun mi ofte sekvos dum la venontaj tagoj. Li lasas min nun. Vetero belas hodiaŭ.

Venontnokte mi dormos en *Freiburg in Brisgau*, kiu troviĝas aliflanke de Rejno. Do kiam, iom post meztaga paŭzo, mi vidas ponton je mia dekstro, mi iras maldekstren

por iri serĉi la pontkomencon, kaj mi transiras.

Tuj post la ponto, kiu laŭ mi irigis min al Germanio, aperas maldekstre haŭlovojo, kompreneble senaŭtomobila, preter arbaro. Ĝoje mi decidas ĝin uzi ; tiel mi estos trankvila.



Ponto trans Rejno

La sola problemo estas ke, kaj tion mi scios nur post duonhoro, tiu-ĉi rivero, kiun mi transiris, estas nur la duono de Rejno : *la Nova Rejno*, kie iras la boatoj. Sed kelkaj dekoj da metroj malantaŭ la arbaro troviĝas *la Malnova Rejno*, kiun mi ankaŭ devintus transiri, per dua ponto iom post la unua. Sed pri tio mi ne atentis. Mi do sekvas dum duonhoro tiun ŝtonetan vojeton, kaj sekve reen.


Unue tiu longigo, tempo “perdita” tendas min, sed mi pripensas. Finfine ne estas tiom aĉe ; mia vojo plilongiĝis nur de unu horo, en la tago tio ne estas tiom tro, ĉefe hodiaŭ ĉar mia vojaĝero ne estas inter la plej longaj. Kaj plie, tiu aventuro estis ilo lerni geografiaĵon. Kaj tio ankaŭ pensigas al mi, ke en la vivo kelkfoje Dio lasas nin erari, sed ne tro fie, nur cele lernigi ion al ni.

Alvenante en Germanion mi rapide malkovras ion ege utilan por la

biciklantoj. Fakte en tiu lando oni vere bone zorgas pri ili. Multaj biciklovojoj konstruiĝis, eĉ tute aparte de la aŭtoŝoseoj ; en trankvilejo, malantaŭarbaroj, preter riveroj ekzemple. Kaj tiuj biciklaj vojoj aŭ aliaj kamparaj biciklotaŭgaj vojoj ĉiam estas indikitaj per ŝildoj. Mi do sekvas *Freiburg*.

Mi transiras valetojn, vinberkampojn, vilaĝojn, kaj fine de la posttagmezo domoj pli kaj pli multiĝas kaj mi ne plu vidas ŝildojn indikante *Freiburg*. Mi do demandas iun virinon, kiu biciklas sur la strato, kien Freiburg. « “Kien” ?! » respondas ŝi, estus pli ĝuste diri “kie”, ĉar ni ĉi-tie estas en Freiburg ».


« Ĉu jam !? » Mi ne vidis enirŝildon.



En Freiburg

Mi do demandas al la virino, kiel atingi mian celatan adreson. Ŝi klarigas kaj demandas, el kie mi venas. Mi rakontas mian vojaĝon. Estas ankoraŭ nur la komenco, sed tamen jam for de mia hejmo, ŝi miras vidante sur la mapo, kiom mi jam biciklis.

Berny loĝas en ĉambro sub la tegmento. Ni instalas matraceton por mi surplanke, apud lia lito. Tie tri najbaroj uzas la koridoran duŝon.



Berny en sia ĉambro subtegmenta

Hodiaŭ vespere Berny devas reiri urben por labori je pretigo de spektaklo. Dume mi iras manĝi al iu teraso en la bela malnova urbo, kie mi renkontas du studentojn el Usono (Boston). Ni babilas germane, kiel ni povas, rakontas niajn vojaĝojn, gustumante salategon nomata "Spartacus".


Tiun ĉi nokton mi ne bone dormas, eble pro la malmoleco de la planko, kaj pro la urba lumo, ĉar la rulkurtenoj fuŝitas. Sed ne gravas... Je la dua mi leviĝas kaj rigardas momenton la apudajn tegmentojn kaj la stelojn en la nokta ĉielo.

Mardon 8an : 3-a tago

Malgraŭ nemultaj dormhoroj mi dank'al Dio ne lacas kaj pretas foriri duonhoron post la 9-a. Berny helpas min repreni mian biciklon el la kelo, kaj refiksi miajn bagaĝojn. La ŝuoj kiuj akvumiĝegis dum la unua tago nun sekas, sed ankaŭ fetoras. Mi hezitas momenton, petas konsilon al Berny, kaj forĵetas ilin en rubujon. Tiel mi havos iom pli simplan transportaĵon, kaj fakte miaj sandaloj taŭgos nun por ĉiuj situacioj.

Eliri la urbegon ne estas tre facile, mi iom perdiĝas inter la stratoj,

transiras pontojn, ktp... Fakte pro tio mi preferas la vilaĝojn !



La domo, kie mi tranoktis ĉe Berny

Denove iom okcidenten hodiaŭ, kaj kompreneble ĉiam norden. Mi retransiras Rejnjon, unue duone sur baraĝa ponto, sekvas senmotor-traffican vojon inter ambaŭ riverpartoj, kaj post kelkaj kilometroj transiras la duan parton sur kluzo. Tie sidas du marŝantoj meze de la kluzo, sur la german-franca landlimo. Ili ankaŭ iras al Strasbourg.



Laŭ la riverego Rejno

Je la 17-a kaj duono aperas Strasbourg. Sed denove granda urbo, eĉ pli granda ol Freiburg verŝajne, kaj mia gastiganto loĝas en Bischeim, kvartalo aŭ eĉ vilaĝo, situante pli norde, t.e. aliflanke de la urbego. Ĉu eblas daŭre sekvi la

rivergon por atingi Bischeim evitante la centron ? Verŝajne ne.

Mi do eniras la urbon, unue tra plimalpli kvietaj, iom tristeca ĉirkaŭurba kvartalo. Mi demandas pri mia vojo. « Bischeim !? Estas fore, tute aliflanke de la urbo, vi bezonas almenaŭ unu horon ! » respondas viro. Supre virino el balkono jesas la diritan horon kaj pripensas la stratojn, kiujn mi devos sekvi. Ŝajnas iom komplike, sed ne gravas, mi konas la direkton.

Sur alia strato, apud bushaltejo mi redemandas pri Bischeim. Iu ulo donas al mi respondon, kiu vere ridigas min :

- Plej simple estas, ke vi trafu la tramon numero 3.

- La tramon !? mi respondas, sed vidu, mi veturas bicikle !

- Vi povos meti vian biciklon en la tramon, Bischeim estas tro for !

« *Kia strangulo* » mi pensas tiam. Kial do mi irus nun trame ? Mia vojaĝo estas bicikla, ne trama, kaj eĉ se mi bezonas unu horon pli, tio ne gravas, mi havas tempon !

Finfine mi alvenas en la urbocentron, preter la strasburga katedralo, trovas ĉefan straton, vojkruciĝon kun ŝildoj, kaj je la 19.20 atingas mian celon.

En la kvartaleteto de mia gastiganto Bruno Flochon, serĉante lian domon mi renkontas virinon kun sia infaneto. Mi minuton diskutas kun ŝi, klarigas kiel mi gastigaĝas dum mia vojaĝo... Ŝi diras al sia bubo : « Vidu, tiu junulo venas el for !, for ! »

Ĉe Bruno ni pretigas pastaĵojn kaj tomatan salaton, rigardas la francan

televidan gazeton. Kvankam la francan lingvon ni ambaŭ parolas, certe eĉ pli bone ol esperanton, ni komentas la novaĵojn en esperanto.

Merkredon 9an : 4-a tago

Hodiaŭ estos longa etapo, sed ne plu necesos transiri Rejnon por reiri Germanien. Bruno donas al mi biciklan mapon de la regiono *Alsace*, en kiu mi estas nun. Li akompanas min ĝis stratangulo, li iras labori bicikle.



Bruno iras labori per biciklo, dekstre staras la mia.

Pikniko longe de Rejno : Nun mi finmanĝas la ŝafinan fromaĝon, kiun donacis al mi Fabienne, el *les Aidges*. Mi ankaŭ manĝas miajn du lastajn *Linzajn* tortojn, iom dispremitajn.

Preterirante Rejnon mi vidas multe da gruz-uzinojn. Verŝajne oni ĉerpas gruzon elfunde de la riverego. Estas granda industrio.

Mi jam rimarkis, ke en urbo, plie en urbego, oni facile perdiĝetas kaj uzas multe da tempo (mi ne ŝatas uzi la vorton "perdi", kiam temas pri tempo, sed tamen...). Tial volante eviti *Ludwigshafen*, mi esploras mian mapon kaj iras de vilaĝo al vilaĝo.

Malfruiĝas.

19h30 : en Waldsee mi preterpasas glacivendejeton. Mi lacas kaj malsatas. Vojo ankoraŭ farotas, sed paŭzo endas. Post hezitado mi bremsas, iras kelkajn metrojn reen kaj starigas mian biciklon ĉe la muro de la domo.

Sur la teraso sidas homoj. Virino leviĝas :

- Ĉi tie ni vendas italajn glaciaĵojn, ŝi diras germane per itala akĉento.

Kiam mi diras, ke mia avino estas italino, la maljuna vendistino ekparolas al mi itale. Mi iom komprenas, sed bedaŭrinde ne povas respondi en tiu lingvo. Mi elektas *stracciatella* kaj citronon. Bon-gustas.

Dum mi ĝuas mian glaciaĵon, mi iom parolas kun la “paŭzumantoj”. Momenteton mi forgesas la horon. Mirinde ; mi parolas germane kun italoj, sed mi estas franclingvano. Kaj jam ŝajnas al mi nekredeble, ke mi alvenis en tiun “truon”, vilaĝeto perdita en la mondo, jam tiom malproksima de mia hejmo, nur per biciklo.


Malfruiĝas, ĉielo malheliĝas. Finfine je 21h20 mi alvenas en Ruchheim kun lacego. Sed eble feliĉe mi ne scias, ke ne estos mia plej malfrua alveno, nek mia plej grava laciĝo.

Mirjam, juna virino, venas malfermi la pordon kaj montras mian ĉambron.

- Kiam vi pretos, grimpu al la etaĝo kaj vi povos manĝi ion, ĉar vi kredeble malsatas ! Ŝi diras.

Neniam mi havis tian grandan ĉambron kun lito, seĝo, sofo, eĉ

banĉambro nur por mi ĉi nokte. Post kiam mi duŝiĝis, mi grimpas, kaj sonorigas ĉe la unua etaĝo. Sed neniu respondas. « Strangas, ĉu ne estas la bona etaĝo ? Mirjam tamen diris la unuan... » Do mi grimpas hazarde al la supra kaj sonorigas. Bruo aŭdiĝas, pordo malfermiĝas. Estas mezaĝa viro, per noktoĉemizo vestita. Tute verŝajne ne estas tie ; la homo demandas, kiu mi estas, kaj kiam mi pardonpetas, dirante ke estas eraro, ke mi devas iri suben, li malfacile kredas min, eble timas.



Mia granda ĉambro

Finfine en la unua etaĝo la patrino de Mirjam aperas je la pordo. Fakte Mirjam ne respondis ĉi foje, ĉar ŝi malbone fartas ; ŝi estas graveda kaj travivas nun dolor-periodon.

Ili kuiras por mi picon kaj ni babilas momenton trioje. Kiel mia patrino, tiu de Mirjam, Ingrid, komencis lerni esperanton kaj jam ĉion komprenas sed respondas nacilingve.

Je la 23-a mi reiras ĉambren kaj, post skribado en la gastolibro, dronas en mildan dormon.

(Daŭrigo venontnumere)

Novjara Renkontiĝo en Frankfurto (Noro)

Raportas Mara Bartoli




La familio Bartoli : Jolan, Mara, Ael kaj Daniel

Se vi estus demandinta al ni unu tagon antaŭ la renkontiĝo, ĉu ni ŝatus iri al Noro, la tuta familio eble estus kap-neinta. Kial? La infanoj volis ludi kun la novaj ricevitaj ludiloj de Kristnasko, kaj ni simple volis ripozi kaj ne sekvi horaron...

Sed rigardu mem, kiamaniere nia humoro rapidege ŝanĝiĝis !

La 27an de decembro ni kvar portante du grandegajn, pezajn valizojn, kvar dorsosakojn kaj plenŝtopitan papersakon de manĝaĵo retrovas Nancy en la stacidomo de Laŭzano. Ŝi tiras grandan valizon kaj havas grandegan skatolon malfacile porteban subbrake. Ne, ni ne forveturas por unu monato. La duono de mia pakaĵo estas por okazontaj programeroj de la renkontiĝo (paraŝutludoj kaj kandelornamado) kaj Nancy kunportas multe da materialo por fabriki kajtojn.



Laurent Burgbacher kun sia filo Noah

Dieter Rooke, Laurent kaj Murielle Burgbacher kun siaj infanoj Lea kaj Noah ne veturis kun ni. Ni ĝojas revidi ilin. Jes, la novjara renkontiĝo en Germanio ebligas ankaŭ renkonti svisojn !

En la frankfurta junulargastejo apud la rivero Majno ni tuj salutas kelkajn konatojn. Nun Daniel kaj mi vere ĝojas babili esperante surloke. Ni parolas kun paro el Siberio, Olga

kaj Viktor, kiuj frostas en Frankfurto !! Ve, Olga eĉ ne kunportis ĉapon. Ĉe ili estas dudek gradoj malpli varme ol ĉi tie, sed sen tiu malagrabra vento. Imagu, ili vojaĝis dum tri tagoj trajne por atingi Moskvon kaj daŭrigis aviadile.



Olga kaj Viktor Obratsov el Siberio

Dum nia interparolado, la infanoj tiras niajn manikojn, valizbendon, jakpinton – ili volas nepre vidi nian ĉambron.

Post nur kvin minutoj Ael kaj Jolan kontrolas ĉion: la ŝaltilon, necesojn, duŝon, matracon, ŝrankon, kranon, seĝon, kurtenon, lumon de nia ĉambro. Dum ili diskuras, ni konsultas la semajnan programon por la infanoj kaj tiun por la plenkreskuloj.

La temo de la semajno estas "la kvar elementoj". La diversaj salonoj nomiĝas tero, akvo, fajro kaj aero. (De la salono aero ni havas belegan vidindaĵon super la urbo.) Kion elekti?

Danielon allogas la programoj "la financa krizo", "esperanto en entrepreno", "Vikipedio" kaj li nepre ŝatas havi sufiĉe da tempo por viziti la libroservon.

Mi preferas programerojn, kie oni povas moviĝi aŭ manlabori. Do mi (kaj certe ankaŭ Nancy) iros ekzerci la polonezon, kiu estos prezentata dum la silvestra balo, kaj partoprenos cirklodancojn.




Mara ĝoje trikas

Mi tre amuziĝas dum la "bestotrikado". Ne ridu, mi konscias, ke oni imagas tion iomete polva, sed ni multe babilas, ridas kaj miras trikante. Pli diversa grupo ne povas esti. Infanoj, jes ankaŭ knaboj, virinoj kaj Yves, kiu profitas la okazon por lerni triki (mi ne plu memoras, ĉu li sukcesis fini sian katon!). Ĉu vi scias, ke ĉiu lando havas sian propran trikmetodon? Kaj se vi vidus Olgan el Rusujo hokiltriki beston fulmrapide, vi tuj silentus !! Ne malofte sidas ankaŭ netrikantaj "vizitantoj" en nia rondo, kiuj simple ĝojas pri la bona etoso.

Jolan faras kajton kun Nancy (ŝia programero havas grandan sukceson) dum Ael ĉeestas la projektadon de lumbildoj pri la kvar elementoj en la kosmo. La infanprogramo estas tre alloga kaj proponas ion por ĉiu aĝo. Kantoj, improviza muzika teatro, dancoj, manlaborado, akrobatiko, eksperimentoj pri aero, fajro aŭ

akvo. Dum la ĉiutaga tre amuza piŝama rakonto kun Nicky oni nombras preskaŭ pli da plenkreskuloj, ol da infanoj !



*En la urbocentro :
rekonstruitaj trabaj domoj*

Post kelkaj tagoj niaj infanoj ne plu diskuras en nia ĉambro sed en la tuta domo. Ili ludas "policistoj kaj ŝtelistoj" kun multaj infanoj. Ni kelkfoje devas rememorigi al ili, ke ni loĝas en hotelo kaj ke krei tra koridoroj, eĉ esperante, ne estas tolerata. Ili kuras kilometrojn ludante kaj ni marŝas kilometrojn ilin serĉante !

Ne eblas priskribi ĉiun programeron. Ni ne povas fari ĉion, ĉar ni volas ankaŭ vidi iom el la urbo, kaj promeni apud la rivero Majno, estas bona okazo por iomete aerumi la lacajn kapojn. Ne kredu, ke ni enlitiĝas frue. Post la vespera

programo (koncerto, teatro, prezentoj de la partoprenantoj) la "kneĵpo" (trinkejeto) plenas.



Kun sufiĉe da ekzerco kaj la silaba metodo de Eddy ni feliĉe sukcesis finaranĝi la rubik-kubon.

Dum tiu semajno mi retrovas la samajn sentojn, kiujn mi havis dum renkontiĝoj en junulargrupoj, kiam mi estis dudekjaraĝa. Impreson iomete aparteni al granda familio, ne sufiĉe dormi, ludi ĝis profunda nokto kaj simple ĝui la bonan etoson.

Nun ni estas denove hejme. La dum Noro faritajn raketveturilojn de la knaboj, la seskolora rubik-kubo (Nancy kaj mi partoprenis la programeron "magia kubo") kaj multaj belaj memoraĵoj igas, ke ni ne forgesos tiun semajnon kaj certe partoprenos la venontan !

Ankaŭ raportas Nancy Fontannaz

Kun la familio de Mara kaj Daniel Schöni Bartoli mi partoprenis agrablan semajnon en Frankfurto sur Majno, Germanio. Mi renkontis 144 personojn el diversaj landoj : Argentino, Belgio, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario,

Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rumanio, Rusio, Svedio kaj Svislando, inter kiuj troviĝis 62 infanoj ! Mi tre ĝuis la etoson. Ni loĝis en vasta Junulara Gastejo.



Infanoj pretigas kajtojn

Diversaj okupoj estis proponitaj sub la temo « *la kvar elementoj* » por la infanoj kaj junuloj. Ekzemple : partopreni en rakontoj, ludoj, ŝminkado por la silvestra festo kaj por la teatro, vizito de la muzeo « Hirthara Petro ».

Por la plenkreskuloj proponiĝis kursoj por komencantoj, konversaciaj esploroj, malstreĉiĝo, diversaj prelegoj aŭ diskutgrupoj pri esperantista politika movado EDE, gestolingvo, Herzberg, Su-Dĝok-Terapio, Yumeiho, ktp.

Dum la tuttaga ekskurso al Darmstadt ni vizitis la kvartalon laŭ la konstrustilo « Jugendstil », ankaŭ la muzeon kaj ĉirkaŭiris la domegon planitan de Hundertwasser, kiu mortis en la jaro 2000, iom antaŭ la fino de la konstruo.

Ni ankaŭ promenis en Frankfurto laŭlonge de la rivero Majno kaj vizitis en la urbo ĝian malnovan belan kvartalon kun trabaj domoj, apud kvartalo de altegaj ĉielskrapantoj ! Antaŭ la Borso staris 2 statuoj : bovo : simbolo de borskresko kaj urso : simbolo de borsfalo... En centra strato mi tre miris pri grandega arta truo en domo tute vitrita...



Promeno laŭ la rivero Majno

La 31-an de decembro, post longa vespermanĝo (riĉa bufedo) kaj mallonga dancmomento, ni supreniris la domon por admiri grandan piroteknikaĵon, kiu okazis ĉie en la urbo. Bedaŭrinde la morgaŭon la stratoj estis tre malpurigitaj de la restaĵoj de raketoj kaj manĝaĵoj...

Mi tre ŝatis la ludvesperon, kaj multe da ludoj estis proponitaj la tutan semajnon ! Dum la muzika vespero pluraj partoprenantoj proponis sian arton. Marde Christoph Frank prezentis marionet-teatraĵon pri la barono « Münchhausen ». Li vere kapablis mirinde aktori sole sed plurvoĉe !...

La lastan vesperon okazis belega teatraĵo, infanoj prezentis akrobatikon, kiun ili ekzercis, kelkaj muzikis aŭ kantis, kaj la trik-grupo amuzis nin antaŭ ol montri, kiujn bestojn ili sukcesis triki dum la tuta semajno.

Por scii pli vizitu la retejon :

www.EsperantoLand.org !

Grandan dankon al Lu Wunsch-Rolshoven kaj Christoph Frank pro la bonega organizo ! La renkonto estis vere sukcesa ! Ĝis la venonta !

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Tago honore al Claude Piron

Memortago pri Claude Piron okazis la 15an de novembro 2008 en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Akcepto de la partoprenantoj estis en CDELI, sekvis filmprezentado franclingva en la filmprojekciejo de la biblioteko kaj posttagmeze pluraj personoj rakontis siajn memorojn pri Claude Piron.

Enkondukaj vortoj

- *Anita Perič Altherr*

Bonan tagon kaj bonvenon al vi ĉiuj. Jen ni estas ĉi tie multnombraj por honorigi kaj simpatiumi je nia amiko Claude Piron. Tristajn li ne volus nin, *kontraŭe!* Per leĝera kaj serena horo ni dediĉas ĉi tagon al samideano. *Homo* kiu tiom donis al ni kaj al esperanto entute. Tiun ĉi nian kunestadon plenigos posttagmeze homoj lin bone konantaj. Ili venos laŭvice paroli pri li.

Apartan bonvenon al Nicole, lia edzino. Ŝia ĉeesto donos al tiu ĉi tago apartan signifon. Al vi, Nicole, ni direktas plenrespektan esprimon kaj simpatio-senton. Dankon pro subteno al via edzo en lia aktivado. Ni ne volas sondi vian koron. Vi sentu vin amate kaj

konsolate en iaj pezaj momentoj. Nicole, ni estas kun vi. Se vi hodiaŭ emus, bonvolus, dezirus preni la parolon, ni tion multe aprezus.

Ni revenu al nia kara Claude memorante lin vigla, verva, sprita, simpatia amiko.



Anita Perič Altherr

Karaj ĉeestantoj, permesu ke mi ankaŭ *vianome* danku la organizantojn de tiu ĉi kunveno. Dankon precipe al kiu filmis estigante

revidebla la mienon tiom amatan de ni. Dankon al kiuj prenos la parolon, tiel ke nia tago fariĝos neforgesebla.

Vivrakonto pri Claude Piron

La 29an de junio 2008 Mireille Grosjean intervjuis Nicole Piron, la edzinon de Claude, en ŝia hejmo en Gland, Svislando.

Ĉar aperis kelkaj fantaziaj donitaĵoj pri la vivo de Claude Piron en la artikoloj aperintaj tuj post lia morto, ŝi deziras precizigi kelkajn punktojn.



Claude Piron prelegis en Roterdamo pri afazio (fotis LEK).

Claude Piron naskiĝis en Namur, Belgio, la 26an de februaro 1931. Tie li travivis sian infancon kaj adoleskantan aĝon. Tie li travivis la duan mondmiliton kaj estis forte ŝokita de tiu brutala evento. Ĉefe la 12an de majo 1940, kiam la naziaj trupoj invadis Belgion, kaj la 4an de septembro 1944, kiam la aliancanoj forpuŝis

la germanojn, okazis fortaj bombardadoj en Namur. La juna Claude devis fuĝi al kamparo kun sia tuta familio. Ĉiun jaron, kiam revenis tiuj tagoj, li rememoris pri la tragikaj eventoj de la milito.

Li studis en altlernejo en Antverpeno kaj poste en Ĝenevo, Svislando, en la fama altlernejo pri Tradukado kaj Interpretado. Tie li studis la rusan kaj la hispanan dum la jaroj 1952 kaj 1953.

Poste li devis militservi en Belgio. Dum tiu servo li faris la enirkonkurson por la profesio de tradukisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj sukcesis.

En la jaro 1956 li iris al Novjorko kaj laboris tie por UN kiel tradukisto, protokolisto kaj redaktisto. Ĉar en 1956 okazis la krizo de Suez kaj la krizo en Budapeŝto en Hungario kaj pro la fakto, ke Claude Piron regis la rusan, lia rolo kiel tradukisto estis ege grava. Ekzemple li devis resti hejme por povi esti kontaktita kaze de bezono por rapide traduki ion novan. Ĉe UN Piron lertiĝis kaj diplomiĝis pri la ĉina lingvo. Li do regis la kvin lingvojn de UN: la francan, la anglan, la rusan, la hispanan kaj la ĉinan. En tiu tempo la araba ne ankoraŭ estis UN-lingvo.

Lia restado en Usono finiĝis en 1961.

Dum tiuj novjorkaj jaroj li konatiĝis kun kolegino Nicole Sabathé kaj ili geedziĝis en la jaro 1958. Poste venis en tiu familio tri infanoj.

En Novjorko Piron komencis studi psikologion en universitato.

En la jaro 1961 li komencis novan laboron kiel revizoro kaj protokolisto en Ĝenevo, Svislando, ĉe Monda Organizo pri Sano. Tio daŭris dek jarojn ĝis 1971. Dum tiu tempo li ofte devis profesie vojaĝi al Afriko kaj Azio.

En la jaro 1978 li fariĝis svisa civitano.

De 1971 ĝis 1975 li studis psikologion en Ĝenevo. Dum tiu studado li jam komencis instrui en la fakultato pri pedagogio de la granda svisa urbo. Li do estis paralele studento kaj profesoro. Li multe aktivis en la Instituto Charles Baudouin en Ĝenevo. Paralele li havis pacientojn por psikoterapio. Ankoraŭ la tagon de sia morto, la 22an de januaro 2008, li havis pacientojn.

Liaj loĝlokoj estis :

En Belgio: Namur de 1931 ĝis 1956.

En Usono: Novjorko de 1956 ĝis 1961.

En Svislando de 1961 ĝis 2008: Grand-Lancy (1961-1966), Coppet (1966-1999), Gländ (1999-2008). Li neniam vivis en Parizo.

Li esperantiĝis en la aĝo de naŭ jaroj. Kun sia frato li intense ek-

studis ĝin en la aĝo de dekdu, dektri jaroj.



Mireille Grosjean

La tuta familio estis katolika. Claude Piron multe grumblis kontraŭ la eklezio. Lia spiriteco estis granda. Liaj interesoj estis grandegaj, same liaj interesoj pri iuj religioj. Li havis multajn kontaktojn kun judoj en Novjorko. Tie li aŭdis jidan lingvon. Li eksciis pri juda deveno de Zamenhof. Dum la dua mondmilito kaj poste li eksciis pri Ŝoao, grandskala mortigo de judoj. Aparta fakto ludis fortan rolon: Claude en la aĝo de naŭ jaroj malkovris Esperanton kaj parolis pri tio kun sia instruisto de la elementa lernejo. Tiu ĉi ne ridis, ne primokis lin, sed aŭskultis respektoplene. Do Claude estis feliĉa. Dum la milito tiu instruisto malaperis kaj probable estis mortigita kiel judo. Tion eksciis Claude Piron. Konsekvence li havis multajn ligojn kun judaismo. «Sed mi neniam aŭdis, ke li havis rektan familian ligon al la judoj», diris Nicole Piron.

Miaj renkontoj kun Claude Piron

- *Mario Bélisle*

Enkonduko

Mi ne ofte parolas esperanton al grupo kiel tiu ĉi, kun homoj kiuj tre bone regas nian lingvon.

Tio signifas, ke mi ne povas esperi kaŝi miajn gramatikajn erarojn. Antaŭvidante tion, mi alportis provizon da literoj «-n», kiujn vi uzu libere, se mi forgesas akuzativojn!

Tiel mi sentos min pli trankvila, por libere rakonti al vi kelkajn el miaj memoraĵoj pri Claude Piron.



Mario Bélisle kun siaj filoj esperanto-parolantaj Romain kaj Samuel.

Do, mi ne intencas specife paroli pri la longdaŭra agado de Claude Piron favore al esperanto... aliaj jam faris tion pli fake ol mi. Anstataŭ mi simple rakontos miajn personajn memoraĵojn.

Renkontiĝo

Mi konatiĝis kun Claude Piron en 1989, dum unu el liaj multaj ĉeestoj en la Kultura Centro

Esperantista. Li ofte venis tie por prelegi, tio estas neniu surprizo. Mi kompreneble ne memoras ĉiujn detalojn pri mia unua renkontiĝo kun li, sed mi estas certa pri almenaŭ unu afero: estas ke, antaŭ ol mi venis al Eŭropo, mi jam aŭdis la nomon de Claude Piron.

Kiam mi ankoraŭ estis en Montrealo (mia devena urbo), mi iomete lernis esperanton kaj oni tiam legigis al mi la tekston *Confession d'un fou européen*. Mi memoras, ke tiu teksto ĝojigis min. Kaj mi vidas hodiaŭ, ke pluraj el vi ankoraŭ ĝojas, kiam ni parolas pri tiu teksto.

Do mi iel sentis, ke la renkontiĝo kun tiu fama moŝto de la movado devis estis speciala momento. Sed tiu sento (pri moŝteco) nur daŭris kelkajn minutojn, ĉar Claude forvaporigis ĝin. Li havis tiun simpatian sintenon, ke li tre atente aŭskultis la personojn kun kiuj li parolis... Tiuj el vi, kiuj konis lin, memoras tion. Krom la altnivela preleganto, kiun ni ĉiuj konas, Claude estis ankaŭ simpla kaj humana homo, kaj ĉiam estis agrable renkontiĝi kun li...

Serioze, ĉu iu kapablas memori Claude Piron kolera aŭ grumbra al iu persono antaŭ li? Mi ne... Eĉ antaŭ la plej aktiva advokato de la angla lingvo, Claude restis egala, klarigante siajn punktojn per trafaj argumentoj. Tio neniel rilatas al liaj lingvokonoj, ĉu ne? Pri tiuj

profundaj homaj kvalitoj de li, mi ŝatas memori.

«Le défi des langues»

Iam, en 1991, Claude parolis al mi pri sia projekto aperigi en la franca lingvo ampleksan libron pri lingvoj. Temis pri iu «psiko-analizo de la internacia komunikado». La pripensita titolo estis «Le syndrome de Babel» aŭ io tia. Kompreneble, temas pri lia franc-lingva libro *Le défi des langues*.

Estis por mi granda surprizo, ĉar Claude ne nur volis diskuti pri la libro, li demandis min ĉu mi havis tempon por relegi lian manuskripton. Unue mi ne povis kredi tion! Sed mi rapide komprenis, ke li volis provi la franclingvajn ekzemplojn, kiujn li metis en la libro, por esti certa ke ili estis tute kompreneblaj ne nur por francoj, sed ankaŭ por svisoj, belgoj kaj kebekanoj. Ŝajnas, ke mi estis ankoraŭ sufiĉe kebeka en tiu epoko!


Do, en 1991, mi ricevis liajn printitajn foliojn por legi. Kaj mi tre atente tralegis ĉion. Post tio, ni renkontiĝis. Ni ambaŭ vojaĝis parton de la distanco, mi el La Chaux-de-Fonds, li el Coppet, kaj ni renkontiĝis en Yverdon. Estis somero, mi memoras pri longa agrabla posttagmezo sur sunplena teraso. Ni trafolumis la paĝojn; mi kun miaj notoj kaj komentoj, li kun ruĝa skribilo en la mano. Kaj ni longe diskutis pri diversaj

paragrafoj. Dank' al tiu malgranda helpo al li, mi poste havis la honoron legi mian nomon ĉe la enirpaĝo de tiu libro. Kun aliaj kompreneble ĉar mi scias, ke Claude reviziis same la tutan tekston ankaŭ kun aliaj homoj.

Do, tio signifas du aferojn :

– la unua estas, ke mi povis legi la libron antaŭ ĉiuj el vi!

– la dua, ke Claude vere konsciis pri la serioza utilo de sia aperonta libro, kaj li volis, ke ĝi estu kiel eble plej preciza por ĉiuj franclingvanoj.



Geneviève kaj Emmanuel Piron

Ni ankaŭ parolis pri la maniero trovi eldoniston, kiu akceptus presi tiun libron. Montriĝis, ke la eldonejo Presses de L'Harmattan eble akceptus presi ĝin, se ni kapablu montris, ke la libro havas jam konvinkitan publikon.

Post nia labora posttagmezo, Claude kaj mi iom pli parolis pri li, pri lia kono de la ĉina lingvo, pri diversaj memoraĵoj ktp. Mi ne detaligu ĉi tie, sed dum tiu post-

tagmezo mi sentis kreski amikecon al li.

Poste, ni denove pridiskutis la libroprojekton, kaj mi decidis ensalti apud Claude en la aventuron. Komence de 1994 mi skribis al L'Harmattan, kaj oficiale antaŭmendis 100 librojn, por dissendo en Svislando, en Kebekio, kaj ĝenerale en la esperanto-movado, sed ekster Francio. Tio montris al L'Harmattan, ke ni serioze kredis pri la venonta sukceso de tiu libro. Tiel, post pli da kontaktoj inter Claude kaj L'Harmattan, la eldonejo decidis aperigi la libron en 1994. Kelkaj antaŭmendoj helpis konvinki ilin. Mi devas konfesi, ke Claude Piron mem investis la monon de mia unua mendo.



Geneviève kaj Nicole Piron

En 1994 kaj 1995 ni kunlaboris por dissendi tiun libron al pluraj ricevantoj. Pluraj romandaj bibliotekoj de Svislando ricevis unu ekzempleron (do se vi ankoraŭ ne legis tiun libron, aĉetu ĝin... aŭ sciu, ke sufiĉas peti ĝin en via urba biblioteko). Ni ankaŭ sendis ekzemplerojn al diversaj indi-

viduaj personoj, ĝis Ĉinio. Kelkaj el tiuj homoj estis tre famaj: Umberto Eco, Claude Hagège kaj aliaj. Funkciis tiel: Claude verkis leterojn, sendis ilin al mi kun listo da adresoj, kaj mi plu sendis por li tiujn leterojn, kun libro en paketo. Tiel, sendante librojn sianome, li elspezis sian investon.

Sed ni ne nur donis la librojn. En unu jaro mi mendis entute 280 librojn ĉe L'Harmattan. Kaj mi iom post iom vendis ĉiujn ekzemplerojn. Mi konscias, ke tio estas malmulte kompare al la tuta unua eldono, kiu estis – se mi bone memoras – de 3000 libroj. Kaj la libro estis poste represita. Sed tamen mi ŝatas pensi, ke mia kunlaboro kun Claude helpis al la disvastiĝo de lia bona libro. Almenaŭ mi spertis kun Claude, kia aventuro estas aperigi libron. Kaj tio estis amuza!

Hejmaj vizitoj

Kvankam Claude kaj mi interŝanĝis multajn leterojn dum tiuj jaroj, mi nur trifoje vizitis lin kaj Nicole en ilia hejmo.

Memorinda fojo estis en julio 1994, kiam Marion kaj mi piediris de La Chaux-de-Fonds ĝis Santiago de Kompostela, ĉe la fina fino de Hispanio. Survoje ni estis amike gastigitaj en Coppet, kiel etapo de tiu longa migrado. Post pluraj tagoj ni povis tie uzi la lavmaŝinon por lavi vestaĵojn; estas ĉiam utila afero dum pieda vojaĝo!

Mi ankaŭ memoras pri unu alia vizito en Coppet, okaze de iu festo. Estis tiam iom pli da homoj en la domo kaj en la ĝardeno. Mi iris sole. Sed kiu festo estis? kaj kiam precize?... mi devas konfesi ke mi forgesis.

Solena okazo

Du jarojn poste, Marion kaj mi geedziĝis. Je tiu okazo, mi demandis al Claude, ĉu li akceptus esti mia atestanto dum la geedziĝa ceremonio. Mi kuraĝis demandi al li, kvankam mi povis imagi, ke li daŭre havis plenplenan kalendaron. Kaj li amike akceptis. Dum la ceremonio, li ankaŭ laŭtlegis tekston de Sankta Paŭlo : «*Quand bien même j'aurais le don des langues, sans amour, je ne suis rien.*» (Proksimume: «Eĉ se mi havus la talenton por lingvoj, sen amo, mi estus nenio.») Kaj post tiu ceremonio, dum la bankedo, Claude kaj Nicole sidis ĉe tablo kun ses aliaj esperanto-parolantaj invititoj, kiuj ĝoje sidis kun ili.

Denaska esperanto-edukado

Nu, post geedziĝo... venas infanoj, ĉu ne? Nia unua infano, Romain, naskiĝis en 1998. Lia patrino Marion serioze pripensis la aferon, ĉu ŝi eduku lin tuj denaske kiel esperanto-parolanta infano. Dum pluraj monatoj ŝi partoprenis en diskutrondoj tra interreto.

En tiu diskutrondo (kiu nomiĝas Denask-L) Claude ankaŭ re-

gule skribis komentojn. Li donis plurajn konsilojn, ofte psikologiajn... al multaj gepatroj ĉirkaŭ la mondo. Ĉiuj liaj intervenoj estis tre seriozaj, sed foje tute amuzaj. Ni ankoraŭ memoras pri tio.



Mario Bélisle kaj Emmanuel Piron

Ĉu la konsiloj de Claude taŭgis? Kompreneble jes! Sed tiuj, kiuj dubas pri la rezulto... parolu kun niaj infanoj post 20 jaroj...

Konkludo

Marion revidis Claude kelkfoje poste, kiam ili ambaŭ partoprenis en aranĝoj. Dum mi ne. Mi memoras pri nur unu lasta vizito. Ni venis triope al Gland, tiam kun Romain ankoraŭ juna (malpli ol trijaraĝa). Ni pasigis agrablan posttagmezon kun Claude kaj Nicole, kun kiuj ni diskutis interalie pri edukado. Tiam ankaŭ estis la psikologo, pli ol la esperantisto, kiu parolis. Sed temante pri Claude Piron, ĉu eblas apartigi tiujn du rolojn? Mi kredas ke ne.

En 2002 naskiĝis Samuel, kiu ankaŭ ricevas denaskan esperanto-edukadon. De tiam mi ne revidis


Claude, sed kvankam mi daŭre forgesas akuzativon, mi neniam

forgesos lin, lian afablecon kaj amikecon. Dankon!

Rememoroj pri Claude Piron

• *Olivier Tzaut*

Antaŭ ol paroli pri mia amiko Claude, mi ŝatus kanti al vi du kanzonojn, kiujn li adaptis el la tutmonda folkloro. En 1977 kaj 1981 mi faris du diskojn, kiuj ne ekzistus sen Claude, ĉar estas li, kiu donis al mi plimulton el la kanzonoj. Jen por komenci *Ni perdis liberecon*, cigana rusa kanzono.



Olivier Tzaut

El tute alia parto de la mondo, el Usono, venas nun la jena kanzono *Dek ses tunojn (sixteen tons)*. Ĝi parolas pri la ekspluatado de homoj fare de aliaj homoj.

Mi ekinteresiĝis pri esperanto pro Claude Gacond, kiam mi eklaboris kiel instruisto en la mont-

ara lernejo de Mont-Soleil, kien mi iris en printempo 1957 por ses monatoj kaj kie mi restis 38 jarojn...

Mont-Soleil ne estas malproksima de La Sagne, kie loĝis Claude Gacond, la frato de mia bofrato Jacques, kaj Claude transdonis al mi la esperanto-viruson.

Unua renkontiĝo

Kaj nun pri Claude Piron. Sed antaŭe eta prezento pri Edmond Privat. Mi vidis unu solan fojon Edmond Privat, probable unu jaron antaŭ lia morto, kaj en 1963 mi partoprenis en Neuchâtel manifestacion je lia memoro. Dum tiu ĉi René Gacond, kuzo de Claude, prezentis mirindajn fotojn de birdoj. Li komentis ilin france kaj iu ankoraŭ juna sinjoro, akompanita de sia edzino kaj de tute juna knabineto, faris la tradukon, kaj ni ĉiuj tiam admiris lian tradukan talenton. Tiu rimarkinda esperantisto estis, vi jam divenis, Claude Piron.

Pri tiu ĉi renkontiĝo mi havas amuzan anekdoton. Pierre Bovet, la fama pedagogo kaj esperantisto, ĉeestis (tio ankaŭ estis la sola fojo, kiam mi vidis lin) kaj li rakontis, ke foje li troviĝis kun la edzino en perdita loko de la indonezia kamparo. Estis vespere kaj ili estis tute

perditaj. Kiel komuniki kun la tieaj homoj, kiuj ne parolis la anglan? Pro tio ili decidis provi esperanton. Kiu scias? Ili do frapis ĉe pordo de iu domo kaj alparolis la loĝantojn en... esperanto. Kaj la miraklo okazis: oni respondis al ili en esperanto!

Esperanto en la lernejojn

Mi ne plu memoras, ĉu mi havis kontaktojn kun Claude dum la postaj jaroj ĝis eble 1970 aŭ 1971. Tio kio estas certa estas, ke en 1973 mi lanĉis kun gekolegoj kampanjon por enkonduki esperanton kiel elekteblan lingvon (langue à option) en la lernejojn.



Claude Gacond, Nicole Piron, André Sandoz

Tiu periodo estis por mi tre interesa kaj ankaŭ plena je ekscito, kaj la helpo de Claude Piron estis tiam absolute necesa, fundamenta, same kiel, kompreneble, tiu de Claude Gacond. Li produktis tiam bonegajn tekstojn pri esperanto, kiujn ni nepre bezonis por nia agado. Malfeliĉe pro manko de mono ni devis

ĉesigi la kampanjon, sed mi parolos iomete pri ĝi pli malfrue.

Claude Piron estis kaj restis ĝis la lasta minuto de sia vivo tiel produktiva – kaj ne nur en esperanto, sed ankaŭ en la franca kaj en la angla – ke li tre ofte pensigis min pri la abela aŭ formika reĝino, kiu pasigas sian tutan vivon ovonaskanta. La diferenco estis, se mi povas tiel esprimiĝi, ke Claude estis vira reĝino! Ĉar mi ne plu aktivas de multaj jaroj en la esperanto-medio – mi prezentas al vi miajn bedaŭrojn – mi ne povas kompari Claude Piron kun aliaj tre kompetentaj kaj produktivaj esperantistoj, sed mi estas certa, ke la tutmonda esperanto-movado perdis unu el siaj plej brilaj advokatoj. Kaj mi mem perdis karan amikon. Ni ne renkontiĝis ofte dum la lastaj jaroj, sed estis ĉiam por mi granda plezuro trovi lin kaj Nicole kaj ĉiufoje li havis ekscitajn novaĵojn por diri al mi. Feliĉe tamen nun restas Nicole kaj ni ne intencas perdi la kontakton. Kaj nun antaŭ ol silenti, mi kantas ankoraŭ kanzonon de Claude: *Elimeleĥ*, juda kanzono el orienta Eŭropo.

Tekstoj pri esperanto

Antaŭ ol paroli pri la helpo, kiun Claude Piron donis al ni en nia kampanjo *Esperanto en la lernejojn*, jen du aliaj kanzonoj. Unue *Voĉe de gitaro mia*, tre populara en Meksikio, kaj *Mal-*

proksime de la monto, kanzono el Peruo.

Do, kial mi jam diris, Claude multe helpis en nia kampanjo *Esperanto en la lernejojn*. Mi havas ĉi tie kelkajn dokumentojn, kiujn ni vastskale uzis tiam. Ĉiuj estis verkitaj de Claude:

– *Pourquoi l'espéranto à l'école?* (Kial esperanto en la lernejoj?).

– *Quelques réflexions sur l'introduction de la première langue étrangère à l'école primaire* (Kelkaj pripensoj pri la enkonduko de la unua fremda lingvo en la elementan lernejon).

– *Structure linguistique et accusatif* (Lingvistikaj strukturoj kaj akuzativo). Tiuj du lastaj tekstoj aperis en *L'Éducateur*, la porinstruista gazeto.

– *Confession d'un fou européen* (Konfeso de eŭropa frenezulo) kiu aperis en la revuo *Documents pour l'enseignement* eldonita de Centre d'éducation européenne en Bruselo.

– *Lettre ouverte au Directeur général de l'OMS* (Malfermita letero al la ĝenerala direktoro de OMS).

– *Lettre à Etiemble*, doktoro en la Sorbonne pri ĝenerala kaj komparita literaturo, kiun Claude Piron sukcesis persvadi pri la literatura beleco de esperanto.

– En 1977, kiam mi faris la diskon *Tra l' mondo*, Claude verkis *Brèves indications linguistiques* (Mal-

longaj lingvistikaj indikoj) por la aĉetontoj, kiuj ne parolis esperanton.

Prelegoj en porinstruistaj lernejoj

Kun Claude mi faris prelegojn en diversaj porinstruistaj lernejoj en Romandio. Ĝenerale mi estis sola, sed Claude povis de tempo al tempo liberiĝi por akompani min kaj la entuziasmo, ekzemple en la porinstruistaj lernejoj, estis eksterordinara! Mi memoras interalie unu vendredan posttagmezon (kaj tia momento ne estas aparte taŭga, je la fino de la semajno) en la porinstruista lernejo de Porrentruy. Nia prezento de esperanto daŭris de la dua ĝis la kvina horo (!), kun nur unu kelkminuta paŭzo. Je la kvina la manoj ankoraŭ leviĝis por fari demandojn (!), sed tiam la direktoro diris: «Mi bedaŭras, sed ni devas nun fini. Multaj el vi havas trajnon.» Estis vere nekredeble! Claude alportis sian grandegan kompetencon, mi kunportis mian gitaron, kaj mi tre simple diros, ke ni formis tre konvinkigan paron...

Alia memoraĵo: en Sion (Valezo). Tie estis nur estontaj instruistinoj. La direktorino poste diris al ni: «Mi ne scias, kion vi faris al ili, sed ili estas tute ekscititaj!» Kaj kiam mi demandis al ŝi, kiel ŝi estis interesiĝinta pri esperanto, ŝi diris: «Mi legis la *Confession d'un fou européen*. Ni abonas la revuon.»

Domage ke ni devis ĉesi nian agadon pro manko de mono! Mi havis familion kun tri infanoj kaj devis nin vivteni per duona salajro ĉar mi laboris tiam duontempe por esperanto kaj duontempe en mia lernejo.

Claude Piron pozitive markis sian epokon

Claude instruis en la tiel nomita *Faculté de psychologie et des sciences de l'éducation* en Ĝenevo kaj ĝenevaj kolegoj tiam diris al mi, ke ili multe ŝatas liajn kursojn kaj lian humanecon. Jes! Claude Piron mankas kaj mankos al ni. Li vere estis unu el tiuj homoj, kiuj markas profunde kaj pozitive sian epokon. Sed mi dirus nun, ke ni ĉiuj povas envii lian manieron forlasi tiun ĉi teron. Li foriris en plena aktiveco kaj en plena posedo de siaj rimedoj! Kiam lia horo alvenis, fronte al la komputilo, kie li laboris kaj ke li komprenis, ke estis alveninta la momento ĉion forlasi, mi povas imagi, ke li diris: «Mi petas vin,

lasu min fini almenaŭ mian frazon!» – «Ne! ne! estis la respondo. Via horo alvenis! Lasu ĉion kaj venu!» Li do ne povis fini sian frazon, sed mi scias, ke li estis preta foriri – tion li diris al mi kelkajn monatojn antaŭe. Kaj lia foriro, kvankam ĝi estis brutala por la familio kaj por ĉiuj, kiuj lin amis, estis laŭ mi *absolute reĝa!* Kiel ne deziri morti kiel li, plene vivanta kaj zorganta pri io, kion ni plej ŝatas en la vivo!

Kaj por fini jen lasta kanzono. Ĝi estas izraela lulkanto, kiun Claude adaptis en esperanton. Ĝi estis unu el la du lulkantoj, kiujn mi kantadis al Nikolao, mia tri- aŭ kvarjara knabo ĉiuvespere. Li alvokadis min: «Paĉjo, venu kanti!» Do mi alvenis kun mia gitaro kaj restis stare ĉe la piedo de la lito. «Ne, sidiĝu!» Do mi devis sidiĝi, Nikolao metis sian dikfingron en la buŝon kaj mi komencis kanti. Kaj se li estis sufiĉe laca, la du lulkantoj (la alia estis *La lulkanto de Svetlana*) sufiĉis kaj je la fino li dormis. Jen do *Dormu, filo!*

Omage al Claude Piron

• *Nancy Fontannaz*

Jam antaŭ 1985 Claude Piron helpis min revizii tekston gravan por mi. Kun senlima pacienco li korektis kaj plibonigis miajn frazojn, ĉiam klarigante la kialon de siaj intervenoj, kio kompreneble multe helpis min poste.

Laŭ mia peto, ĉirkaŭ 1983/84, li korektis paĝojn de oldulino, kiu penis traduki librojn de Omraam Mikhaël Aïvanhov. Ŝiaj kajeroj estis tute ruĝaj pro korektoj kaj klarigoj... Sed Claude diris al mi, ke li ne kuraĝis korekti pli, ĉar li timis ofendi kaj malkuraĝigi ŝin... Vidante la problemon mi

petis al Claude rekte mem traduki kelkajn librojn de tiu aŭtoro. Post kelkaj jaroj 4 libroj kaj 2 broŝuroj naskiĝis. Mi varme rekomendas ilin al vi, ĉar mi tre ŝatas ilin, enhance kaj pro la bela traduko.

Claude tre bone kapablis redoni la simplan kaj klaran stilon de Aĭvanhov. Por mi kaj aliaj estas modelo de traduko, oni regalas sin, komparante kun la originala franca. Claude diris, ke li sentis sin en harmonio kun tiu aŭtoro, pensis kiel li. Pro tio li tiel bone tradukis lin!

Por mi kunlabori kun Claude estis granda ĝojo kaj belega sperto. Li tre afable aŭskultis miajn sugestojn, foje akceptis ilin, foje ne, klarigante kial. Mi multe lernis! Nun li ofte mankas al mi, mi ofte ankoraŭ ŝatus peti al li solvon en traduko...



Nancy Fontannaz

La eldonisto donacis al mi por vi kelkajn broŝurojn. Se necesas, oni povas mendi ilin senpage al Prosveta. Pluraj inter vi jam ricevis ilin. Mi ege rekomendas mian preferatan *Feliĉu, eblas!*

Do por fini mi nur povas diri grandan *dankon* al Claude Piron, kiu restos por mi amiko kaj modelo.

(Fotis Nancy Fontannaz kaj LEK.)

Claude Piron plue vivas en sia verkaro

● *Claude Gacond*

Mi unuafoje renkontiĝis kun Claude Piron per lia poemo *La soldato kiu marŝas* aperinta en la *Esperanta Antologio* redaktita de William Auld por la centjara jubileo de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, do fakte ekzakte antaŭ kvindek jaroj:

*La soldato kiu marŝas
en la vento
en silento
sur la vojo kiu marĉas
sian korpon ne plu sentas.*

*Lia menso fakte brutas,
nur la laco
kaj l'agaco
de la pluvo kiu gutas
senkompate lin turmentas. [...]*

En mia rifuzo soldati impresis min tiuj pironaj versoj pri la *militserva sort'*.

*... Kaj samkiel en armeo
la rezono
pri ordono
ne ekzistas pro obeo
kun neeblo de escept',*

*tiel mankas la kompreno
pri l' motivo
de la vivo,
kaj nur eblas ĉi sinteno :
plua iro kaj akcept'.*

Sed mi ne povis akcepti kaj tial dum miaj ferioj mi deĵoradis en civil-servaj agadoj. En Valezo ni konstruis fromaĝejon en Erschmatt kaj vojojn en paŝtejoj super Chandolin. Tuttage mi ŝvitadis, ĉar tiam help-maŝinoj ne faciligis la laboron. Poste la pirona poemaro *Malmalice* per sia versaro *La pioĉanto* revivigis al mi la lacigajn valezajn laborrestadojn, kvazaŭ Claude Piron kunŝvitas apud mi:

*La viro pioĉis, pioĉis
ŝtonetan kaj hardan la teron,
sub brulo, sub brilo, pioĉis,
spitante la ardan someron.*

*La basko ĉemiza eliris
el sub pantalono malpura ;
frapante li akre elspiris,
kun peno, per spiro terura.*

*Sub lia ĉemizo ŝvitplena
muskoloj laŭritme sin rulis
kadence kun movo la pena.
Sub moko de suno li brulis.*

*Hararo brilgrasa malsekis
kaj gutojn fluigis vizaĝo,
pioĉe li teron revekis,
pioĉe kun frapa kuraĝo. [...]*

Tiu civilserva pioĉado kondukis al venko. Nun Svislande junuloj rajtas civil-servi anstataŭ soldati. Miatempe tio ne eblis, tial ni proteste pioĉadis, kiam ni ne estis enkarcerigitaj pro rifuzo soldati. Kaj ĉar karcere la sola permesita libro estis *La Biblio*, tial mi bone lernis esperanton trastudante la zamenhofan tradukon de la *Malnova Testamento*. Nun mi daŭrigas tiun lingvan studon interalie per relego de poemoj de Claude Piron, kiuj konvinkas min, ke la zamenhofan idiomon li riĉigis per beletraj perloj. Kaj mia plua civil-servado estas nun malkovrigi tiujn trezorojn al lernantoj, por ke ili ekfieru pri la kultura indeco de esperanto.

—OOO—

Aŭdvidaj prelegoj kun Claude Piron

– *Socia afazio*: Ĝenevo, 2007.

– *Les langues: un défi*: Serio de dek disaŭdigoj en la franca, 2008. Realigis François Randin.

Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2008

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen indekso de la pasinta jaro 2008.

La redaktoro: Claude Gacond.

Mallongigoj :

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

e-o = esperanto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonomo de

tp = titolpaĝoj

vd = vidu

Titolo de libro aŭ periodaĵo

A

Afrika Komisiono (UEA) : n4p1.

Afrikanoj kaj mi (Grosjean) : n3p25.

Afriko : n2p18, n3p24-26.

Agado por la Lingvaj Rajtoj : n3p4.

Al la semanto (Grabowski) : n3p40.

Alasko : n3p4, 19.

Aleksandrov, Konstantin : n2p23-29.

Alemanio : n3p10.

Allemand, Jacqueline : n3p14.

Allemand, Luc : n1p5, n2p3-4, 8, n3p9, 11-12, 14, 17, 27, n4p5, 21-25.

Alpoj : n1p7, n4p29.

Altherr, Anita : n3p12, 16-17, n4p4.

Alzaca Ekologia Muzeo : n1p9.

Amikoj de CDELI : n1p6, n3p16, tp3, n4p1, 5-6, tp3.

Andreae-Lätt, Christiane : n2p11, n3p12, 21.

Antanaitis, Audrys : n4p34.

Antverpeno : n2p18.

Aragon, Louis : n2p22.

Auld, William : n1p11.

Aŭstralio : n3p24.

Aŭstria Nacia Biblioteko : n1p21.

Azia E-o-Movado : n2p10-11.

Azio : n2p18.

B

Bachmann, Louise : n3p11.

Badoux, Françoise : n2p19.

Baghy, Julio : n3p13-14, 33.

Balmelli, Enrico : n3p5, 9.

Banet-Fornalowa, Zofia : n3p38.

Barnes, Ronald : n3p4.

Bartoli, Mara : n1p11, 14-15.

Basel (Bazelo): n1tp3, n2p4, tp3,3tp3, n4p37, tp3.

Basso Michel : n1p9.

Baudelaire : n1p17.

Baudoin, Charles : n2p18.

Baumgartner, Carlo : n1p9, n2p10, 14.

Baumgartner, Dorothée : n1p9, n2p10.

Baur, Arthur : n3p33.

Baupierre, Henri ps Vatré, Henri.

Befers Himmie, Blanyon : n3p26.

Bélisle, Mario : n3p14, 16-17, n4p4, 28.

Bélisle, Romain : n3p14.

Benina Esperanto-Asocio : n3p25.

Benino : n3p24-25, n4p1.

Berger, Ric : n3p33.

Berlina Esperanto-Ligo : n1p6.

Berna regiono Gantrisch : n2tp3, n3tp3.

Bern(o) : n1p24, tp3, n2p1, 3-4, tp3, n3p10, n4p37.

Béroud-Focke, Nicole : n1p8, n2p10.

Bettingen : n1tp3, n2p10, tp3.

Béatrix-Koleva, Sonia : n1p6, n4p6.

Bjalistoko : n4tp3

Biblio : n2p6.

La Biblio – ĉu historio? ĉu legendoj?

(Cherpillod) : n2p6.

Bibliografio de la verkaro de Henri Vatré

(Haupenthal) : n1p21.

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds : n3p16, n4p4.

Bickel, Andres : n2p20.

Biel(o) : n2p4, n3p10, n4p1.

Binder : n1p13.

Biondi, Anna : n3p3.

Blanc, Claude : n1p4.

Blanke, Detlev : n1p6, n3p30, 33, 35.

Blick : n4p35

Blocher, Christoph : n1p23, n2p15.

Bloom, Renate : n3p2.

Boller, C. : n2p9, n4p26.

Bona Espero (Brazilo) : n1p9.

La bona lingvo (Piron) : n2p8, 16, 19, 22.

Borsboom, Ed : n3p33, 35, 41.

Boulet, Jean-Pierre : n3p24-25.
 Boulogne-sur-Mer : n4p11.
 Boulton, Marjorie : n1p11, n3p37-38.
 Bovet, J. : n2p9.
 Bovet, Pierre : n1p17, n3p33.
 Britio : n3p24.
 Brugger, Franz : n2p11.
 Brun, Sonja : n1p12-13, n2p12, n3p22, n4p13.
 Budapeŝto : n1p17.
 Buhlmann, David : n1p4, n2p11, n3p11.
Bund : n3p35.
 Burgbacher, Laurent : n2p11.
 Burundio : n3p24-25.

C

Carlevaro, Tazio : n1p4, 8, n3p31, 33.
 Carlevaro, Teresita : n1p4.
 Carol, Luiza : n1p7, n2p13-14.
 CDELI : n1p5-8, 10, tp3, n2p3, 5-8, 18, 21, n3p9, 15-17, 28, 30, 39-40, n4p1, 4-6, 11, 19, 28, tp3.
 Ceresole, Pierre : n3p13-14.
 Chaplin, Charles (Ĉaplino) : n4p33.
 La Chaux-de-Fonds : n1tp3, n2p3-4, 18, tp3, n3p13, 16, tp3, n4p3, tp3.
 Chaves-Walder, Verena : n1p13, n2p12, n3p23, n4p19.
 Cherpillod, André : n1p6, n2p5-7, n3p15, 17, tp3, n4p5, 28.
 Chong-yeong, Lee : n3p4.
 Civito : n3p32, 34.
 Cizikaite, Aida : n3p25.
 Clerici, Ranieri : n1p16, n3p1, 2.
 CONGO (Konferenco de NRO-j) : n3p2-3.
 CRIE (Comité romand pour l'information de l'espéranto).
 Common, Charmian : n3p1, 7, 19-20, n4p1.
 Comtesse, Bernard : n1p10.
 Cool, Gerard : n1p6.
 Coop : n4p36.
Coopzeitung : n3p35.
 Coppet : n2p18.
 Cornuet, Didier : n3p11.
 Corsetti, Renato : n2p15, n3p2
 Cotton, Armand : n3p27.
 Cotton, Yvonne : n3p27.
 Couturat, Louis : n2p5.
 Creux-du-Van : n1tp1, p21.
 Cueni, Raphaela : n1p7.

Ĉ

Ĉeĥio : n3p24.

Ĉilio : n3p4, 19.
Ĉu Esperanto post vivos la jaron 2045 ? (Carlevaro) : n3p31.
Ĉu rakonti novele ? (Piron) : n2p19.

D

Dahan, Lucien : n2p14.
 Dalcroze, J. : n2p9.
 Dasgupta, Probal : n1p16, n3p2.
 Daubercies Chatelan, Sonia : n2p11-12, n3p11, n4p7.
 De Beaufront, Louis : n2p5.
Le défî des langues, du gâchis au bon sens (Piron) : n2p17, 19.
10 raportojn pri Japanio (Hori) : n2p10.
Deklaracio de Homarano (Zamenhof) : n3p14.
 Deklaro de Homaj Rajtoj : n3p18.
 Delegacio por Alpreno de Helplingvo I-a : n2p5.
 De Mestral, Dominique : n1p11, n2p9, 11, 16, 22.
 De Mestral, Elisabeth : n1p12, n2p9, 11, 15-16, n4p8-12, 26-27.
 De Reynold, Gonzague : n3p32-33.
 De Saussure, René : n2p5, n3p39.
 Dettling, Annelies : n1p12, n2p12, n3p22.
 Di Vetta, Arlette : n3p5, 8.
Dia Regno : n4p21.
 Döring, Erna : n1p9, n3p5, 9.
 Dovat, Lucienne : n3p11.
 Drewitz, Nina : n1p9.
 Dunant, Henry : n1p12, n2p12-13, n4p13-19.

E

Ebura Bordo : n3p24-25.
 Ecabert, Charles : n2p21.
 Ederveen, Derk : n4p26
 Edipresse : n4p37.
 Eichkorn, Bernhard : n1p6.
 Eisenegger, Elisabeth : n1p13, n3p11.
 Ekzamena Komisiono (ILEI-UEA) : n3p25, p40.
El Popola Ĉinio : n1p6.
 Elmer, Peter : n3p12.
 Elsner, Verena : n1p4.
En Svisujo (Słowacki) : n3p38.
Enciklopedio de E-o : n3p32
 Ernst, Rolf : n1tp2.
 Ertl, Istvan : n3p36, 39.
 Escher, Arnold : n4p30.
 Escher, Conrad : n4p30.
 E-a Svisa Koruso : n2p9.

E-o : n2p5, n3p15, 19, 24, 30-31, 34, 38.
E-o (revuo de UEA) : n3p35.
E-o Aktuell : n3p35.
E-o en perspektivo : n1p18, n3p32, 37.
 Esperanto-filmoj : n4p32-33.
 E-o-Klubo por funkciuloj de UN : n2p18.
 E-o-Land : n1p14.
E-o organizaĵoj lokaj:
Basel : ESB = E-o-Societo Basel : n1p8-9, tp3, n2p10, tp3, n3p18, n4p7.
Genève : E-o-Genève-Régions: n1p10.
Genève : E-o-Grupo La Stelo : n1p9, tp3, n2p10, n3p18-21, n4p1, 2, 7.
Kantono de Neuchâtel : n1p10.
Lausanne: LES = Laŭzana E-o-Societo : n1p11, tp3, n2p10-12, 18, tp3, n3p21, n4p7-8.
Luzern: LES = Lucerna E-o-Societo : n1p4, 12-13, tp3, n2p12, tp3, n3p22, n4p13-19.
Wil: E-o-Klubo Wil : n1p13, n2p12-13, tp3, n3p23-24, n4p19.
Zürich: ESZ = E-o-Societo Zürich : n1p13, tp3, n2p13, n3p24, n4p20.
E-o tiel parolata (Huĝimoto) : n3p28.
 Espinosa, Ricardo : n3p2.
Esprimo de sentoj en e-o (Privat) : n2p20.
 Eterna : n4p11.
 ETI (Ecole de traduction et d'interprétation) : n3p3.
 Etoy : n2p9-11, tp3, n4p8, 27.
 Eŭropa Unio : n3p18.
 Eŭropo : n3p24.
F
Faktoj kaj Fantazioj (Boulton) : n1p11.
Fausto (Goethe) : n1p24.
 Favre, Alain : n3p5, 27.
 Favre, Maurice : n4p28.
 Federacia Konsilio : n1p23.
 Fethke, Jan : n4p33.
 Fiescher, Olivia : n3p23-24.
 Fiescher, Wolfram : n1p13-14, n2p12, n3p8, 23.
 Fiechter, Annelies : n1p9.
La floroj del l' malbono (Baudelaire) : n1p17.
 Fondaĵo Antoni Grabowski : n3p36, 38.
 Fondaĵo Ivo Lapenna : n3p37.
 Fontannaz, Nancy : n1tp2, p4-6, n2tp2, p3-4, 8, 22, n3tp2, p12, 14, 16-17, 27, n4tp2, p5-6.
Fonto : n1p21-22.
 Forel, Auguste : n3p33.
 Forge, Jean ps Fethke Jan.
 Francio : n3p24, n4p34.

Frauchiger, Beno : n3p21, n4p8.
 Fregonara, Odette : n3p12.
 Frutschi-Jaquet, Anne-Marie : n3p14.
 Frutschi-Jaquet, Edy : n3p14.
Fundamento de Esperanto : n3p38.
G
 Gacond, Andrée : n1p6, 21, n2p3, 19, 21, n3p12, 13, 30.
 Gacond, Claude : n1tp1, n1tp2, p5, 7, 16, 21, tp3, n2tp1-2, p3, 8, 18-22, tp3, n3tp1, tp2, p5, 7-10, 13-14, 16-17, 30-31, 33, tp3, n4tp1, 2, p1, 4-6, 13, 28, 31, tp3.
 Gacond, Gabrielle : n1p6, n2p19.
 Galor, Zbigniew : n3p28.
 Ganao : n3p24, 26.
 Garcia Gomez, Emilio : n3p12.
 Gastejo Edmond Privat : n2p20, n4p28.
 Gaussen, Georgette : n4p3.
 Gaxer, Walter : n3p12.
 Gazzola, Michele : n3p3.
 Gbadanasi, Latifou : n3p25.
La gefratoj (Goethe) : n3p38.
 Genève : n1tp3, p17, n2p4, 18, tp3, n3p1, 7, 10, n4p1, 11.
Gerda malaperis (Piron) : n2p10, 17, 21.
 Germanio : n4p34.
 Gerster, Sarah : n2p4.
 Gessler, Claudia : n3p12.
 Giloteaux, Lilli : n2p21.
 Glättli, Ernst : n1p7, n3p12.
 Gland: n1p16, n2p18-19, 21.
Glossaire des patois de l'Ajoie et des régions avoisinantes (Vatré) : n1p17.
 Goethe J. W. : n1p24, n3p38.
 Grabowski, Antoni: n3p36-38, 40-41.
 Graf, Bruno : n1p1, n2p1, n3p5, 7, 16-17, 33, n4p4.
La granda didaktoro (Chaplin) : n4p33.
 Grin, François : n3p3, 18.
 Grosjean, Mireille : n1tp2, p1-2, 4, 7, 16, n2tp2, p1-2, n2tp2, n3p5-10, 20, 24-27, n4tp2, p1-3, 21.
 Grossmann, André : n1p9.
 Grossmann, Hans-Werner : n1tp2 p3-4, 7, n2tp2, p19, n3tp2, p5, 7, 10-12, n4tp2, p1.
 Gruring, Jean-Bernard : n3p14.
 Gruring, Sébastien : n2p4.
H
 Haas, Fritz : n3p33.
 Hadas-Lebel, Mireille : n2p6.
 Haenni, G. : n2p9, n4p26.

Haitao, Liu : n3p35.
Hamlet (Shakespeare) : n1p11.
 Haupenthal, Reinhard : n1p6-7, 21-22.
 Heiden : n2p13.
 Heim, Albert : n4p30.
HeKo kaj Heroldo Komunikas : n3p34-35.
 Hillel : n2p6.
 Hiroyuki, Usui : n1p7.
 Hodler, Ferdinand : n1p7, n4p11..
 Hodler, Hector : n1p7, n2p5, n3p33, 39, n4p7, 11.
 Hofberg : n2p13.
 Homaj Rajtoj : n3p3, n4p1.
L'homme qui défia Babel (Centassi) : n4p12.
La homo, kiu defiis Babelon (Centassi) : n4p12.
 Horacio : n3p40.
 Hori, Jasuo : n2p9-10, n3p25, n4p8-10.
 Huguenin, Agnès : n3p12, n4p3.
 Huguenin, François : n3p12.
 Huguenin, Noël : n1p4, n3p12, n4p3.
 Huĝimoto, Masumi : n3p28.
 Huĝimoto, Tacuo : n3p28.
 Humbert, Yvette : n3p12.
Hura! (Baghy) : n3p14.

I

Ido : n2p5, n3p15, 30, 34-35, n4p28.
Ido, unu jarcento poste (Cerpillod) : n2p5.
 IEL (I-a E-o-Ligo) : n3p34.
Ilitis : n1p17.
L'Impartial : n3p35, n4p28.
Infero (Dante) : n1p11.
Informilo por Interlingvistoj : n3p35.
 Instituto Charles Baudoin : n2p18.
 Interlingua : n3p30, 34, 38.
 Interlingue vd Occidental.
 I-a Feria Altlernejo : n2p18.
 ILEI : n1p2, 5, n2p2, 8, n3p7, 9, 24-25, 40.
 ILEI-Konferenco en Songhai-Centro : n3p24-26, n4p1
 IPNC (Koalicio de Indiĝenaj Popoloj kaj Nacioj) : n3p4.
 Isaak, Heidi : n4p3.
 Islando : n4p37.
 Italio : n3p24.
 Ith-Danneil, Henriette : n1p17.

J

Jaccard-Besson, Marguerite : n1p4, n3p12.
 Jansen, Wim : n1p7.
 Japana E-o-Libro-kooperativo : n1p7.
 Japanio : n3p20-21, 24-25, n4p8.

Jalibro (UEA) : n3p38.
 Jaro de lingvoj : n1p1, n2p1.
 Juda help-asocio : n4p10-12.
 Jung Kee, Lee : n4p3.
 Jayet, Marguerite : n3p5.
 John-Calame, Francine : n1p7, n3p10.

K

Kalocsay : n1p17.
Karlo (Privat) : n2p21.
La Katerino de Finhaut (Haenni) : n4p27.
 KAEM (Komisiono por Azia E-o-Movado) : n4p3.
 KDP (Kristandemokrata Partio) : n1p23.
 KELI-Kongreso : n4p20-21.
 Keller, Stefano : n1tp2, p1, 6-7, n2tp2, p1, 13, n3tp2, p1, 4-5, 9-10, 16-17, n4tp2, p1, 4, 6.
La kimra Biblio (Vatré) : n1p17-22.
 Klag, Walter : n1p6.
 Kobelt, Walter : n2p20.
 Koller, Alois : n3p12.
 Kolombio : n3p4, 19.
 Komisiono E-o Lernejen : n2p18.
 Kongreso de E-istoj-Jurnalistoj : n4p34.
 Konkurso pri Esperanto : n2p10, n3p8, 20-21, n4p1, 2.
 Konopnicka, Maria : n3p38.
 Kooperativo de Literatura Foiro : n4p28.
 Koreio : n4p3.
 Korody, Zsofia : n3p25.
 Kouassi Kouablan, Antoine : n3p25.
 Koutny, Ilona : n3p28, 36, 39
 Kreis-Schneeberger, Clara : n1p8
 Kris, Alen : n3p29-30, 35.
 Kühnel, Peter : n1p6.
 Künzli, Andreas : n1p7, n3p29-41, n4p7, 32-37.
 KCE : n1p7, n2p3, 18, 20-21, n3p9, 28, 40.
 Kwasi Mensah, Paul : n3p26.

L

Lapenna, Ivo : n3p37-38, 40.
 Lausanne : n1tp3, n2p4, tp3, n3tp3, n4tp3.
 Lavanchy, Jean-Jacques : n1p4, n3p12.
 Lelarge, Sylvain : n2p12.
 Le Lignon : n1p17.
 Leoni, Antonio : n3p20.
 Leuch, Martin : n4p30.
Libera folio : n2p29.
 Liberio : n3p26.
 Libro-Foiro Le Salon du Livre : n3p19.
 Ligo de Nacioj : n2p5.
Limsaltanta Folio : n1p10.

Lingvaj Homaj Rajtoj : n3p2.
Lingva genocido en edukado (Skutnabb-Kangas) : n3p3.
Lingvo futura : n3p6, 10
 Lins, Ulrich : n3p36, 39.
Literatura Foiro : n1p22.
Literatura Mondo : n1p5, 17, n2p8.
 Litovio : n4p34.
 Lopez, John Mateo : n3p4.
 Luca : n1p9.
 Lugano : n2tp1.
 Luko, Johan' : n3p29, 34-35
 Luzern : n1tp3, n2p18, tp3, n3tp3, n4p37, tp3.
 Lyon, Anne-Catherine : n2p11, 15.

M

Maillard, Gabriel : n2p11.
 Mallepell, Verena: n3p12.
Malmalice (Piron) : n2p29.
 Mamin, Jeanne : n3p12.
Le Matin Bleu : n4p37.
 Maradan, Mélanie : n3p20.
 Margot, Nicole : n2p11, 16, 19, n3p2, 5, 8-9, 27.
 Markov, Vinko : n3p34-35.
Marŝo de l' Esperantistoj (Grabowski) : n3p38.
 Masson, Henri : n2p17.
 Matsuura, Koichiro : n1p1, n2p1.
 Matthey, Sabrina : n2p4.
 Meier, Hans : n4p3.
 Mekys, Antanas : n1p7.
 Melide : n2tp1.
 Menzi, Peter : n3p12.
 Mescede : n1p14.
Metropol : n4p37
 Metzler, Ruth : n1p23.
 Mickiewicz : n3p38.
 Migros : n4p36.
 Molnar, Monika : n1p5-6, n2p8, n3p9, 17, n4p5.
 Monto Blanka : n2p7.
Morgaŭ ni komencos la vivon (Fethke) : n4p33.
 Morocz, Istvan : n2p20.
 MOS (Monda Organizo pri Sano) : n2p14, 18.
 Movado : n4p11.
 Münger-Ackermann, Marie-Louise: n2p3-4, 19, n3p13.
 Muriset, Steve : n1p10.

N

Namur : n2p18.

Nandir (filmoj) : n3p21, n4p8.
Naŭlingva etimologia leksikono (Bastien) : n4p11.
 Naville, Ernest : n3p33.
 Nederlando : n3p24.
La neĝa blovado (Puŝkin) : n3p38.
Neologisma glosaro (Vatré) : n1p17, 22.
Neue Zürcher Zeitung : n4p35.
 Neuchâtel (Neuŝatelo): n2p4, n3p2.
 Neves, Gonçalo : n1p7, n3p31-32, 35.
La nica literatura revuo : n1p17, 21-22.
 Nicolet, Julien : n2p15.
 Nicolodi, Carlo : n3p12.
 Nobel Pac-premio : n1p7, n3p7, 9.
La Nova Homaro : n2p23.
 Novjara Renkontiĝo en Föckinghausen : n1p14-15.
 Novjorko : n2p18.
 NRO-oj (Neregistaraj Organizaĵoj) : n3p1, 2.
 Ntunzwenimana, Japhet : n3p25.
 Nüesch, Willy : n1p7, 24, n3p41.

O

Oberaargletscher: n3tp1.
 Occidental-Interlingue : n2p5, n3p30, 34.
OLE (Originala literaturo Esperanta) : n1p22.
Ondo de Esperanto : n3p29, 34-36.
 Ortelli, Luciano : n3p12.
 Ory, Gisèle : n1p7, n3p10.
 Oslo : n3p9.
 Ostwald, Wilhelm : n3p33

P

Pariza Grupo de SAT : n2p17.
La parnaso de popoloj (Grabowski) : n3p38.
 Parzival ps Reverdin, Serge : n3p12, 32, n4p3.
Paporta Servo : n4p11, 22, 25.
Patreco (Wolf) : n4p11.
 Perrenoud, René-William : n2p20.
 Perret-Gacond, Chantal : n3p12.
 Perret, François : n2p14-15, n3p12.
 Pétermann, Françoise : n3p12.
 Piron, Claude : n1p16, n2p8, 11, 13-29, n3p5, 8-9, 16-17, 31, 33, n4p4, tp3.
 Piron, Nicole : n1p16, n2p14-15, 19, 21, n3p5.
PIV : n1p15, n2p20.
 Pochanke, Stanislaw : n3p5, 9.
 Popola Universitato de Ĝenevo : n2p14.
 Porrentruy : n1p17.
 Portonovo (Benino) : n3p24, 26.

Pouillerel : n2p21.
 Prandi, Matteo : n2p4.
 Premio Deguĉi : n2p19.
 Premio Grabowski : n3p36-41.
 Prilly : n2p19.
 Privat, Edmond : n2p20-21, n3p33, 39.
 Puŝkin : n3p38.

R

Rado : n4p11.
 Rainer : n1p8, n2p10, n3p18.
 Randin, François : n2p11-12, n3p8, 16-17, 27, n4p4.
 Rameau, J.-Ph. : n2p9.
 Rayen Calfunao Paillalef, Flor : n3p4.
 Reale, Cesco : n3p2, n4p21.
 Régulo-Pérez, Juan : n1p18, 21, n2p22.
Rememor pri Solferino (Dunant) : n4p19.
 Renens: n1p22.
 RERO (interbiblioteka katalogo interreta) : n1p6.
 Retia Fervoja Linio : n4tp1, 30-32.
 Reverdin, Serge vd Parzival.
Revue historique neuchâtoise : n3p35.
 Rey, Anna : n1p12-13, n2p12, n3p22, n4p13.
 Rey, Koni : n1p12-13, n2p12, n3p22, n4p13-19.
 Reymond, Hélène : n3p5, 9.
 Rieser, Willi : n3p12.
 Rivière, Jimmy : n2p20.
 Rodriguez, Marion : n3p20-
 Rolle : n2p13.
 Romanda e-a laborgrupo : n2p8.
 Romandio : n3p10, n4p37.
 Rooke, Dieter : n3p7, 11.
 Rossetti, Reto : n3p37.
 Roterdama UK : n3p27-28, n4p21.
 Rothpelz, August : n4p30.
 Ruchti, Daniel : n3p12, n4p3.

S

Sabiyumbva, Jérémie : n3p25.
 Sântis : n2p7.
 Saint-Luc : n3p21.
 La Sagne : n2p3-4, tp3, n3p13.
 Saksa E-o-Biblioteko : n1p7.
 Sandoz-Giroud, André : n3p12, 30, n4p20-21.
 St.Gallen : n3p23, n4p37.
St.Galler Tagblatt : n4p30.
 San Salvatore : n2tp1.
 Sardona : n4p29.
 SAT : n1p8, n3p34-35.
 SAT-Amikaro : n3p34-35.

Savojo : n2p7.
 Scherer, Paul : n1p4, 12-13, n2p12, n3p22.
 Schild, André : n3p33, 38.
 Schleyer, Johann Martin : n1p7, n3p37.
 Schmid, Sanuel : n1p23.
 Schneller, Martine : n1p6-7, n3p14, n4p6.
 Schneller, Richard : n1p7-8, 17, n2tp2, p23, n3tp2, p5, 8, 10, 29, n4tp2, p29-32.
 Schoeni-Bartoli, Daniel : n2p8, n3p5.
 Schoeni-Bartoli, Mara : n2p8, n3p5.
 Schwyzer, Eduard : n3p33.
 Senhauser, Leonie : n2p13.
 Senn, Hans-Peter : n1p9.
Sennaciulo : n3p35.
 Servo Civila I-a : n3p14.
 Seulo : n4p3.
 Shakespeare (Ŝekspiro) : n1p11.
 Silfer, Giorgio : n1p7.
 Simpozio pri lingvaj rajtoj UN : n3p1, 8, 18-19, n4p1.
Sinjoro Tadeo (Mickiewicz) : n3p38.
 Sixtus Pot, Christiane : n3p5-9, 11
 Skandinavio : n2p10, n3p18, n4p37.
 Skutnabb-Kangas, Tove : n3p3, 18-19.
 Slovakio : n4p21
 Słowacki, Juliusz : n3p38.
 Socia forumo SUFO : n3p23.
 Somera Universitato en E-o : n2p18.
 Someraj kursoj ĉe Sanfranciska Universitato : n2p18.
 La Sorbonne : n2p6.
Specimene (Vatré) : n1p17, 22.
Stafeto : n1p17-18, n2p19.
 Strappazzon, Stéphanie : n2p11.
Sud-Rejna Kuriero : n1p8.
Sur la Jungfrau (Konopnicka) : n3p38.
Suvereno de la kurto kaj koncizo (Haupenthal) : n1p22.
 Svisa Ambasadego en Beograd : n1p7.
Svisa Enciklopedio Planlingva vd Universalaj Lingvoj en Svislando.
 SES : n1p5, 14, 16, n2p8-9, 18, n3p1, 3-4, 6, 10, 16, 20, 39-40, n4p1, 4, 6.
 SES-Estraro: n4p1, 2.
 SES-Ĝenerala Kunveno : n1p1-4, tp3, n2p1-2, tp3, n3p5-12, n4p2, tp3.
SES informas : n1p16, tp3, n2p9, tp3, n3p9-10, 33, 35, tp3, n4tp3.
Svisa Espero : n2p18.
 Svisa Koruso : n4p26.
 Svisa Kurtonda Radio : n2p21.

Svisa Radio-I-a : n2p3.
 Svislando : n3p24, n4p34-36.
 Szerdahelyi, Istvan : n3p36.

T
Tages-Anzeiger : n4p37.
 TAKE : n1p9.
 Tanner, Adrian : n3p20.
 Tchikpe, Privas : n3p25.
Tekste kaj Pretekste : n1p21-22.
 Tête-de-Ran : n2p3-4, n3p14.
 Thommen, Marie-Louise : n2p3-4, n3p13.
 Thusis : n4tp1.
 Tirano : n4tp1.
 Togolando : n3p24.
 Trabor, Theophilus : n3p26.
 Traugott, Rinaldo : n3p11.
 Triolet, Elsa : n2p22.
 Tzaut, Olivier : n2p3-4, n3p13-14, n4p4, 28.

U
 UDC (Unio demokrata de la Centro) : n1p23.
 UEA : n1p1-2, 7, 16-17, n2p1-2, 5, 8, 10, 18-19, 21, n3p1, 4-7, 10, 18, 25, 34, 39-40, n4p1.
 UK (Universala Kongreso de Esperanto) : n1p9, n2p9-11, 18, n3p25, 27-28, 38, n4p26, tp3.
Universala Lingvoj en Svislando : n1p7, 16, 18, n2p17, n3p29-41.
 Universitato de Genève : n2p14, 18, n3p3, 20.
 Universitato Adam Mickiewicz de Poznan, Interlingvistika Fakto : n3p28, 36.
 Universitato de Zürich : n3p30.
 Universitato ELTE de Budapeŝto : n3p28, 36.
 Universo : n4p11.
Unua Libro (Doktoro Esperanto) : n2p5.
 UN (Unuiĝintaj Nacioj) : n1p1, 5, n2p1, 14, 18, n3p1-4-7, 10, 18, n4p1.
 Unesko : n1p1, n2p1, n3p24, 37, n4p29-30.
 Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj : n3p1.
 UNOG (Oficejo de UN en Ĝenevo) : n3p2-3.

V
 Vaŝenina, Valerija : n2p23-29.
 Valano, Johán ps Piron, Claude. : n2p17-19, 29.
 Van Puijenbroek-Walder, Ruth : n2p13, n3p12.

Varsovio : n4p11.
 Vatré, Henri : n1p17-18, 21-22, n2p21.
 Vatré, Simon: n1p17.
 Vergara, José Antonio : n3p31, 35.
Vikipedio: n1p14, 18, 24, n4p30.
La vinberisto (Boller) : n4p27.
20 minutes : n4p37.
 Viredaz, Marguerite : n1p4, n3p12.
 Vité, Paula : n3p12.
Vivi sian veron (Ceresole) : n3p14.
 Vogel, Dietmar : n3p12.
 Vogejoj : n2p7.
 Volapük : n3p30, 37.
 Von Wahl, Edgar : n2p5.
 La Vue-des-Alpes : n2p3-4, 6-7, tp3, n3p14-16, tp3, n4p5, 28.

W
 Waldvogel, Jean-Emile : n3p5, 9.
 Wassmann, Fritz : n1p4, n3p12.
 Wegener, Alfred : n4p30.
 Weidmann, Armin : n1p13, n4p3.
 Weidmann, Dietrich : n1tp2, p13-14, n2tp2, n3tp2, p3, 5-8, 10, n4tp2, p1.
 Weidmann-González Fonseca, Nelida : n3p5-7, n4p2.
 Werner Erich : n4p3
 Westermeier, Manfred : n1p9.
 Wettstein, Henri : n3p12.
 Wick, Bertrand : n4p25.
 Widmer-Schlumpf, Evelyne : n1p23.
 Wil : n2tp3.
 Wolf, Jules : n4p11.
 Wolf, Mathilde : n4p11.
 Wolf, Philidor : n4p11.

Y
 Yositaka, Mine : n3p36, 39.

Z
 Zamenhof, Lejzer : n1p12, n2p12, n3p13-14, 33 38, n4p11-12, 33.
 Zaslowski, Vera : n3p12.
 Zürich : n1tp3, n2p4, n4p37.
 Zoller, Raymond : n2 p19.
20 Minuten / Tamedia : n4p37.

-oOo



Svisa kalendaro

Februare

- 7 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
12 : Basel : ESB : Ĝenerala Jarkunveno.
21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.
21 : Luzern : LES : Ĝenerala Kunveno..

Marte

- 2 : Lausanne : LES : Kunveno.
3 : Basel : ESB : Karnavalo.
3 : Genève : Stelo : Ĝenerala Jarkunveno.
4 : Luzern : LES : Kunveno.
21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.
26 : Basel : ESB : Kunveno luda.

Aprile

- 1 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
4 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Kultura seminario.
6 : Lausanne : LES : Kunveno.
7 : Genève : Stelo : Kunveno.
10 : Redakta datlimo de SES informas.
23 : Basel : ESB : Kunveno rakleda.

Maje

- 4 : Lausanne : LES : Kunveno.
6 : Luzern : LES : Kunveno.
10 : Redakta datlimo de SES informas.
15 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Asembleo de la Amikoj de CDELI.
16 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Kunveno de SES, kaj Kunveno de la Esperanto-Amikaro de CDELI.
25 ĝis 27-a de junio: Feria periodo ĉe CDELI.
28 : Basel : ESB : Kunveno filma.

Junie

- 3 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
25 : Basel : Kunveno Grün'80.

27 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Mond-vojaĝo de Mireille Grosjean.

29 : Rekomenco de la laboro ĉe CDELI.

Julie

- 1 : Luzern : LES : Kunveno.
9 aŭ 16 : Basel : ESB : Kunveno ĉe familio Focke.
25 : Bjalistoko : 94a Universala Kongreso de Esperanto ĝis la 1-a de aŭgusto.

Aŭguste

- 7 : Luzern : LES : Vespera ekskurseto.
10 : Redakta datlimo de SES informas.
15 aŭ 22 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Renkonto kun Privas Tchikpe el Benino.
23 : Basel : ESB : Ŝipekskurso al Rheinfelden.

Septembre

- 2 : Luzern : LES : Kunveno.
7 : Lausanne : LES : Kunveno.
24 : Basel : ESB : Kunveno.

Oktobre

- 5 : Lausanne : LES : Kunveno.
10 : Redakta datlimo de SES informas.
16-17 : Lenk : Svisa Familia Renkontiĝo.
22 : Basel : ESB : Kunveno.

Novembre

- 2 : Lausanne : LES : Kunveno.
5 : Luzern : Kunveno.
26 : Basel : ESB : Kunveno.

Decembre

- 2 : Luzern : Fonduovespero.